


Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

117-a jaro • n-ro 1396 (12) | decembro 2024

Sepdek jarojn post Montevideo | 243

Konversacio kun Duncan Charters | 246



Unesko kaj Esperanto:
70 jaroj da kunlaboro
por lingvaj homaj rajtoj

70a datreveno de la
Rezolucio de Unesko pri Esperanto
(Montevideo, 10 decembro 1954)



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:

Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org
Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande;

informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.

Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.

Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,

1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimуме €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en

Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org



Unesko kaj Esperanto:
70 jaroj da kunlaboro
por lingvaj homaj rajtoj



243

Sepdek jarojn post Montevideo. Unesko en 1954 rekonis la meritojn de Esperanto

Granda plimulto fine akceptis la rezolucion. Ĝia dato estis ideala: la 10-a de decembro, la internacia tago de homaj rajtoj.

246

Konversacio kun Duncan Charters

Ni parolis pri multaj gravaj aferoj, pri la sukcesoj de UEA, kaj ankaŭ senkompate starigis la plej gravajn kaj defiajn demandojn, al kiuj la membroj deziras ricevi respondojn.

252

Tintilo kamela sonadas sur vojo vortplena. Pri la internaj sentoj en starigo de la reta vortarego

Mi elspezis kvin monatojn laborante po dek kvin horojn tage kaj finfine sukcesis elfari la unuan eldonon.

254

Bonaj, efikaj spuroj de la 109-a UK en Afriko

Gravas tio, kio restas post la fino de la kongreso. Leviĝas la demando: ĉu la ĉi-jara UK lasis bonajn, efikajn spurojn en Tanzanio, en Afriko?

Unesko | 244

Sukceso de milionoj!

Amadou Mahtar M'Bow | 245

Esperanto en universitatoj | 250

Esperanto kaj edukado al la paco en la Metodo Montessori. Dua parto

Landa agado | 253

Fizika klaso en Burundo

Evento | 255

Cigna kanto de Arkoneso

Evento | Esperanto en universitatoj | 256

Junajn interpretistojn en Matriĥto inspiras Esperanto

Fake, Science kaj Profesie tra la mondo | 257

IKU reokazos virtuale dum la VK. AIS invitas proponojn por IVU-16 kaj SUS-41

Oficiala Informilo

Esperanto en universitatoj | 258

Studentoj kaj instruistoj adiaŭas la Interlingvistikajn Studojn en Poznań

Rete | 259

Libro de Etsuo Miyoshi senkoste rete disponebla en Esperanto

Evento | 260

BET-59 en Litovio

Laste Aperis | 261

Indekso-2024 | 262

UEA | 263

Elektio de komitatanoj B

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsau, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Perence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel
(Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj

kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Postel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute
(Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timisoara, Rumanio
Postel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng
(Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Postel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo
(Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Postel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva
(Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu
(Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsom
Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matušov
kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Ing. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>


Sepdek jarojn post Montevideo Unesko en 1954 rekonis la meritojn de Esperanto

■ Ulrich Lins

Se ekzistis internacia Esperanta kvizo, en ĝi povus aperi la demando “Kiu estis la heroo de Montevideo?” Homoj, kiuj jam estis movadanoj meze de la pasinta jarcento, facile respondus. Por helpi la aliajn: mi aludas al evento, kiu antaŭ sepdek jaroj entuziasmigis la esperantistojn kaj akiris historian signifon. Temas pri apogo al Esperanto, esprimita de Unesko fine de 1954 dum ĝia Oka Ĝenerala Konferenco, kiu okazis en la ĉefurbo de Urugvajo.

La rezolucion antaŭis intensa laboro. Vane batalinte en Ligo de Nacioj, post la Dua Mondmilito la esperantistoj esperis havi ĉe ĝia posteulo Unuiĝintaj Nacioj (UN) pli da ŝancoj por internacia subteno kaj tial multlande kolektis subskribojn por peticio direktota al UN. Ĝis la fino de 1949 kolektiĝis subskriboj de preskaŭ 500 organizaĵoj kun entute 15 milionoj da membroj. UN transdonis la petskribon al sia “kultura sekcio”, t.e. Unesko. Sciante pri tio, Ivo Lapenna (1909–1987) kaj liaj kolegoj en UEA laboregis, preparante grandan ekspozicion pri la atingoj de Esperanto montratan en Montevideo okaze de la Konferenco. Lapenna, estrarano de UEA, mem alvojaĝis (ŝipe) el Eŭropo. La meksikia delegitino ĉe Unesko rigardis la ekspozicion kaj estis tiom impresita, ke ŝi submetis proponon favore al rekono de la popolinterproksimigaj atingoj de la Esperanto-movado.

La tuja sekvo estis – seniluziiga. Kiam en komisiono la propono estis traktata, la dana delegito, Andreas Blinkenberg, deklaris, ke Esperanto havas malriĉan vortaron kaj primitivan sintakson. Nur tri delegacioj sekve aprobis la proponon, 23 kontraŭis ĝin. Ĉar Blinkenberg ankaŭ asertis, ke Esperanto eble nur taŭgas por esprimi urugvajajn menuojn, oni mobilizis la publikan opinion. Lapenna kaj la urugvajaj samideanoj lerte elstarigis, ke la mal-



Ivo Lapenna

aprobantoj de la pledo por Esperanto ofendis la gastronomion de Urugvajo.

En ŝanĝita atmosfero la poresperanta propono reaperis sur la tagordo. Rekomendo, ke la ŝtatoj-membroj kuraĝigu al la uzo de Esperanto, devis esti forstrekita. Granda plimulto fine akceptis la rezolucion. Ĝia dato estis ideala: la 10-a de decembro, la internacia tago de homaj rajtoj.

La decido de Unesko de tiam estis tre ofte citata, kompreneble de esperantistoj, sed ankaŭ ekstermovade. Ne ĉie tuj rimarkita, sed atentinda aspekto estis la fakto, ke la poststalina Soveta Unio (kiu estis aliĝinta al Unesko nur

en aprilo 1954) kaj ĝiaj aliancanoj ne kontraŭis la rezolucion, sed sindetenis. Tiel la decido iĝis armilo en la batalo de esperantistoj en orienta Eŭropo kontraŭ la malfavoro de sialandaj aŭtoritatoj.

Lapenna, nia heroo de Montevideo, provis ripeti sian sukceson en 1966. Ekruliĝis nova subskribo-kampanjo, kiu celis atingi, ke UN rekomendu al la ŝtatoj-membroj progresigi la instruadon de Esperanto kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj. Tio refoje okupis la esperantistojn kaj iom altiris simpatiantojn. Sed ĉi-foje ne estis efiko. UN ne volis, simile kiel Ligo de Nacioj kaj Unesko, fari ion, kio ŝajnis troa postulo, limiganta la suverenecon de nacioj. Tion Lapenna, fakulo pri internacia juro, verŝajne konsciis, sed li volis nepre denove aktivigi kiom eble plej multajn esperantistojn. Kaj tiuj volonte-bonvole partoprenis en la senŝanca kampanjo.

Aliflanke, en 1977 la ĝenerala direktoro de Unesko, A.M. M’Bow, venis al la 62-a UK en Rejkjaviko. En 1985 la 22-a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio bonvenigis la centjariĝon de Esperanto. En 2017 en la sidejo de Unesko en Parizo okazis impona aranĝo honore al Zamenhof, organizita de la pola delegacio. Oni tie anoncis la lan-



Antaŭ la komenciĝo de la Plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Ivo Lapenna staras tute malantaŭe.

ĉon de Esperanta (reta) eldono de *Unesko-Kuriero*, kiun plejparte finansas la ĉina registaro.

En Montevideo establiĝis konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. La du ne havas multon komunan. La unua estas la sennacieca popolo de esperantistoj kuntenata per multaj malgrandaj amikecoj, dum Unesko estas granda interŝtata organizaĵo, kiu devas konsideri la ege malsamajn, ofte rivalantajn interesojn de siaj 194 membroj-ŝtatoj. Estas karakterize, ke Unesko ofte deklare subtenas la celon garantii homajn rajtojn. Ankaŭ UEA aŭdigas sin tiusence. Sed en la praktiko ambaŭ evitas eldiri konkrete kion fari por realigo de tiu celo.

Jam de pli ol cent jaroj klarvidaj individuoj postulas, ke internacia kun-

laboro ne limigu sin al ŝtatoj, sed inkluzivu homojn. Tial Nitobe Inazo, la ĝenerala subsekretario de Ligo de Nacioj, entuziasme observis la 13-an UK en Prago (1921). Malfeliĉe li ne povis preterpasi la ĵaluzon de grandaj nacioj. Ne kreskis poste la ŝancoj de Esperanto, kvankam neniam mankis inter intelektuloj, do en parto de la monda publiko, voĉoj, kiuj tenis viva la aferon de Esperanto. Fama verkisto, Arthur Koestler, en 1978 bedaŭris, ke en la epoko de informaj satelitoj, kapablaj transdoni mesaĝojn al la ĉi-planeda loĝantaro, ni ne havas globan lingvon, kiu igus ilin ĝenerale komprenataj: "Strange, ke kun la escepto de kelkaj aŭdacaj adeptoj de Esperanto ankoraŭ neniu, nek Unesko, nek alia internacia organizaĵo venis al la ideo, ke la plej simpla

vojo al interpopola kompreniĝo estus akceli lingvon komprenatan de ĉiuj." Tian penson eble havas spontanee multaj homoj, kio servis al la esperantistoj kiel instigo por la luktado ĉe UN kaj Unesko. Ili iugrade reprezentas la bezonatan „desuban“ internaciismon, alivorte la kulturen bazon, per kies manko oni ofte klarigas, kial UN kaj Unesko ne estas pli forte agnoskataj. Tiuj ĉi organizaĵoj ne konscias, ke Esperanto povus helpi la estiĝon kaj enradikiĝon de internaciismo. Feliĉe, almenaŭ en la menciita konferenco en Unesko pri Zamenhof la itala diplomato Giorgio Novello, patrono de UEA, speciale emfazis la pretervidatan interligiĝon. Li nome substrekis, ke la interna ideo de Esperanto koincidas kun la misio kaj idealoj de Unesko.

Sukceso de milionoj!

■ Sonia Risso

Ekde la unua subskribo kiu kolektiĝis por transdoni al la Uniĝintaj Nacioj la peton pri la agnosko de Esperanto, la muskoloj de la Esperanta movado streĉiĝis kaj fortiĝis je ĉiu aldona subskribo kiu evidentigu la gravecon de nia lingvo. Tio ĉi estis laboro de



miloj kaj miloj kiuj formike malfermis kaj kompletigis la vojon al sukceso okazinta en Montevideo en 1954 ĉe la 8-a Konferenco de Unesko.

Du jarojn pli frue alvenis al la urugvaj esperantistoj la alvoko de UEA por organizi la Unuan Universalan Ekspozicion de Esperanto, kiu fariĝu la spegulo de la agado kaj kulturo de nia movado. Spegulo kiu rapide kaj de unu sola vido montru la amplekson, gravecon kaj buntecon de lingvo kiu interkomunikigas en ĉiujn kontinentojn, trans ĉiujn landajn, politikajn aŭ etnajn limojn.

De Montevideo kaj al Montevideo komencis vigla interŝanĝo de leteroj kiu kovris ĉiujn angulojn de la terglobo petante broŝurojn, librojn, afiŝojn, fotojn, flagojn ktp... Miloj da leteroj skribitaj mane, maŝine, sur delikataj aviadilpapiroj, aŭ poŝtkartoj; vojaĝante en poŝtaj sakoj trajne, aviadile aŭ ŝipe tra la maroj...

La konstruado de tiu ekspozicio aktivigis la tutan movadon, kiu sendis pakaĵojn portantajn la riĉecon de la lingvo. Riĉecon kiu aranĝita kiel eksterordinara ekspozicio fariĝis viva montrofenestro por ke la uneska delegitaro kunigita je 100m en la Parla-



menta Palaco de Montevideo, invitita kaj individue akompanata de la delegito de UEA S-ro Ivo Lapenna, konsciu la buntecon de la movado; tiel ili konvinkiĝu pri la estonta utilo de tiu ĉi lingvo por la kulturo, la scienco kaj la komunikado; sekve ili voĉdonu jese ĉe la Konferenco starigante Esperanton sur alian ŝtupon de respekto kaj de videbleco antaŭ la homoj.

En tiu ĉi jaro, 2024, kaj en la sama dato, la 10-a de decembro, kaj en la sama Parlamenta Palaco de Montevideo – Urugvajo, en kiu okazis antaŭ 70 jaroj tiu voĉdonado, Esperanto celbras sian atingon per Konferenco organizita de UES, UEA, TEJO, ILEI, Eŭroka kaj landaj organizoj en Ameriko. La titolo de la konferenco estas "Unesko kaj Esperanto: 70 Jaroj da kunlaboro por lingvaj homaj rajtoj". Ĝi celas trairi la sepdekan jariĝvojon de kunagado ekde la unuaj klopodoj ĝis la demando pri estontaj agoj.

Pro tio post la legado de la Rezo-lucio ni havos prelegojn pri la unua Ekspozicio, pri la historiaj kaj la nunaj rilatoj inter UEA kaj Unesko, kaj pri la estonteco de tiu kunlaboro inter tiuj du frataj organizoj. Estos prelego pri


La uneska konferenco de 1954



Esperanto kaj homaj rajtoj, kaj la legado de la Manifesto de Ŝventoj ĵus voĉdonita de la Kongreso de TEJO. En la arta segmento estos lerneja infana koruso, kiu kantas en Esperanto, Alejandro Cosabella kun sia repertuaro, kaj Eurokka prezentos specialan filmeton pri la Esperanta kulturo.

Tiu ĉi evento, kiu ricevis la deklaron de "ministeria intereso" de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo de la lando, okazos la 10-an de decembro de la 12-a ĝis la 16-a horo UTC, ĉeesta kaj rete elsendata por ke ĉiuj povu partopreni. Vidu la detalojn, kiuj aperos ĉe Eventaservo: <https://eventaservo.org/el/Montevideo70>.

Venu omaĝi kun ni tiun historian momenton!



Unesko kaj Esperanto:
70 jaroj da kunlaboro
por lingvaj homaj rajtoj

70a datreveno de la
Rezolucio de Unesko pri Esperanto
(Montevideo, 10 decembro 1954)



Amadou Mahtar M'Bow

■ Barbara Despiney kaj
François Lo Jacomo

La 24-an de septembro 2024 forpasis en Dakaro Amadou Mahtar M'Bow, en sia 104-a jaraĝo.

Li naskiĝis la 20-an de marto 1921 en Dakaro kaj, post kariero en Senegalio kiel instruisto kaj ministro pri edukado, li eklaboris por Unesko en 1966, kiel vicdirektoro pri edukado en 1970 kaj Ĝenerala Direktoro de 1974 ĝis 1987. Li estis la unua afrikano, kiu atingis tian postenon en tutmonda organizaĵo. Li vigle laboris por komunikado (1983: Monda Jaro de Komunikadoj, Komisiono MacBride...) kaj subtenis Esperanton, sed lia nova tutmonda ordo pri informado kaj komunikado ne plaĉis al kelkaj okcidentaj landoj: Usono forlasis Uneskon en 1984 kaj Britio en 1985. Britio remembris en 1997 kaj Usono en 2003, sed Usono denove ĉesis pagi en 2011, formale eksmembris en 2017 kaj denove remembris en 2023.

Por ni, esperantistoj, lia direktorado estis ora periodo koncerne niajn rilatojn kun Unesko: en 1977 li vizitis la Universalan Kongreson en Rejkjaviko kaj longe alparolis la inaŭguron. Pariza teamo (Emmanuel Chicot, Pierre Guérout, Barbara Despiney...) ofte kunsidis pri rilatoj kun Unesko kaj ĉeestis multajn Unesko-kunvenojn. TEJO par-

toprenis ĉiujare la kolektivan konsultiĝon kaj atingis vastan internacian renomon inter la junularaj neregistraj organizoj. Ankaŭ ILEI partneris kun Unesko ekde 1977. Duan rezolucion favoran al Esperanto aprobis la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio (1985). La Unesko-sektoro pri Komunikado finacis tritagan simpozion pri Plurlingveco kaj komunikado en la sidejo de Unesko (25-27 novembro 1985), kun partopreno de eminentaj sciencistoj el pluraj kontinentoj. En decembro 1986, UEA honoris lin per la premio Zamenhof, atribuita al personoj de internacia reputacio, kiuj signife kontribuis al la antaŭenigo de internaciaj komunikado kaj kompreniĝo.

La 16-an de novembro 2015, li partoprenis solenaĵon en la sidejo de Unesko pro la 70-a datreveno de la Organizo. François Lo Jacomo sukcesis diri al li kelkajn vortojn pri Esperanto kaj lia reago evidentigis, ke li bone memoras, sed ne eblis vera interŝanĝo. La 25-an de oktobro 2021, Unesko organizis solenaĵon honore al lia centjariĝo, en kiu partoprenis ĉiuj postaj ĝeneralaj direktoroj de Unesko. Kaj solenaĵo pro lia forpaso okazis la 14-an de novembro 2024 en la Unesko-sidejo. Okaze de 50-a datreveno de lia elekto kiel Ĝenerala Direktoro Unesko publikigis specialan numeron de Unesko-Kuriero pri Amadou Mahtar M'Bow.



Amadou Mahtar M'Bow kaj lia edzino en 2021 en Dakaro

“Atestanto de senĉesaj kvereloj rezultantaj el la miskomprenoj, kiuj regis inter [bjalistokaj] malsamaj religiaj kaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof naskis Esperanton kiel rimedon por malfermiĝi kaj interkompreniĝi, perilon de interpopola proksimiĝo kaj, finfine, de espero, de fido je mondo de universala frateco. [...] Kiel emfazis la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, Esperanto ekde nun konkrete prezentiĝas kiel unu el la plej efikaj

iloj de internacia interkompreniĝo, favoranta multflankajn interrilatojn en ĉiuj sferoj de kulturo kaj scienco. Fine, la vivanteco de Esperanto manifestiĝas ankaŭ en tio, ke la Esperanto-movado estas movado de profunde humanisma inspiro.”

*Amadou Mahtar M'Bow, 16 decembro 1986
(akcepto de premio Zamenhof).*

UEA | Intervjuo

Konversacio kun Duncan Charters

La redaktoroj de la revuo *Esperanto* Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova havis detalan konversacion kun la Prezidanto de UEA Duncan Charters. Kaj nun ni deziras prezenti ĝin al vi, karaj legantoj! Ni parolis pri multaj gravaj aferoj, pri la sukcesoj de UEA, kaj ankaŭ senkompatate starigis la plej gravajn kaj defiajn demandojn, al kiuj la membroj deziras ricevi respondojn.

La konversacio aperas du parte: en la decembra numero 2024 kaj la januara 2025.

Revuo Esperanto: *Saluton! Ĉi-jare estas festata la 70-jariĝo de la rezolucio en Montevideo. Ne plu estas inter ni Lapenna, sed ni, esperantistoj, havas respondecon pri la nuna Esperanto-movado kaj ĝia estonteco. Unu el tiaj gravaj aferoj estas daŭrigo de la kunlaboro kun Unesko. Ĉu vi povas diri kiel nun statas la aferoj kaj kiaj estas la perspektivoj? Ĉu UEA sufiĉe dense kunlaboras kun tiu ĉi grava organizo?*

Duncan Charters: Saluton! Efektive nia Estrara kolego François Lo Jacomo intime kunlaboras kun Unesko pri diversaj aranĝoj, pro tio ke li loĝas en Parizo, la ĉefsidejo de Unesko. Li donis raporton pri la agado en la novembra numero de la revuo. Ni provizis servojn al Unesko, kaj pro tio ĝuas bonan kunlaboron. Danke al Pangeo, ni estas en kontakto kun pluraj ambasadoroj ĉe Unesko. Kune kun Urugvaja Esperanto-Societo, TEJO kaj ILEI, ni organizos prestiĝan eventon en Montevideo, la 10-an de decembro, por festi la 70-an datrevenon de la rezolucio. Ni kunlaboras por konkretigi nian partoprenon en la Ĝenerala Konferenco de Unesko kiu okazos ve-



nontjare en Samarkando. Ni ne fine decidis kion ni prezentos al tiu Konferenco, sed UEA havas reprezentantojn. Se ni ne estos pretaj por prezenti trian rezolucion pri rekomendo ke membroŝtatoj priraportu kaj kuraĝigu la instruadon de Esperanto, ni intencas prezenti rezolucion por oficialigi la celebradon de Esperanto-Tago. Ĉiu rezolucio bezonas antaŭpreparon kun ŝtataj reprezentantoj en la Konferenco.

Revuo Esperanto: *La lastaj jaroj montris, ke UEA havas grandajn sukcesojn rilate la integriĝon en la virtualan mondon kaj mastrumas ege sukcesajn retajn projektojn, inter ili eblas elstarigi la tre popularan retejon EventaServo.org. Kiel vi taksas ĝian nunan rolon?*

D.Ch.: Eventa Servo estas absolute esenca por nia nuna virtuala mondo.

Fotoj de John Huang



Ekzistas esperantistoj kiuj ne kapablas moviĝi ekster la hejmon, kaj nova fenomeno estas la “kolibroj” kiuj flugas ĉiutage de unu evento al alia. Ni notis tion en nia loka asocio en Sankta-Luiso, Usono, kaj tiu fenomeno tuj internaciigas kunvenojn kiuj antaŭe estis nur lokaj. Partoprenas kaj edukas nin kuraĝaj samideanoj kiuj daŭrigas sian agadon en landoj suferantaj militadon, kaj ni multe pli bone informiĝas pri okazaĵoj en la mondo el diversaj perspektivoj, ne nur de amaskomunikiloj en nia propra lando. Mi tamen trovis ke mi devas daŭre atentigi pri ĝia rolo, ĉar en tipa grupo la plej multaj eĉ ne vidis ĝin. Tion ni iom post iom ŝanĝas, sendube. Eventa Servo kompreneble estas unu el la multaj servoj de UEA kiujn ni aldonis en la lastaj jaroj. La valoro de UEA-facila estas alia ekzemplo de necesa servo al relative novaj esperantistoj kiun provizas UEA. Nia JuTuba kanalo UEA viva provizas per amaso da vidomaterialo. Tiel rapide oni povas profundiĝi en la uzadon de Esperanto ke ni havas novan fenomenon: kandidatigoj al la Akademio de Esperanto post nur kelkaj jaroj da konatiĝo kun la lingvo! Dum la UK en Tanzanio ni konstatis kiom da afrikanoj bonege regas nian lingvon pro la novaj teknikaj rimedoj se ili havas aliron al ili.

Revuo Esperanto: ...*kaj dum la pandemio UEA, kunlabore kun kelkaj Esperanto-organizoj, iĝis la plej granda kaj la plej sukcesa virtuala konektejo por esperantistoj de la tuta mondo. Tio donis al homoj ne nur la esperon, sed ankaŭ la certecon pri daŭripovo de Esperanto. Nur Mondafest' en 2020 meritas ke minimume oni konstruu monumenton al ĝi kaj ĝiaj realigantoj :).* Ĉu vi konscias kian grandan rolon kaj respondecon UEA havas pri tio? Ĉu ekzistas en la Estraro iu vizio kaj ankaŭ pli bone – certa strategio kiel daŭrigi tiun sukceson?

D.Ch.: Ni ĉiam ĝojas kiam oni rekonas kiom ni sukcesis pozitive atingi per virtualaj rimedoj, kaj UEA fieras esti inter la ekspluatantoj de tiu fenomeno. Tute prave tio certigas la daŭrigon de la uzado de Esperanto kaj la plispertiĝon de ĝiaj uzantoj. Estas iom amuze ke, se ni juĝus la sukceson de Esperanto laŭ niaj tradiciaj kriterioj, ekzemple, membreco en organizaĵoj ĉu lokaj ĉu internaciaj, nombro de individuoj kiuj venas al lokaj kluboj aŭ eĉ al ĉeestaj kongresoj, ni povus pesimisme senesperigi. Tamen se ni juĝus per la nombro de eklernintoj kaj veraj progresintoj pri nia lingvo, inkluzive kvaŭz-profesiajn lingvolernantojn, kiel poliglotoj kiuj antaŭe ĝenerale primokis la ideon de Esperanto, ni eble mirus pri la plivastiĝinta subtera uzado de nia lingvo kiel natura fenomeno inter individuoj kiuj ne vidas kialon aliĝi al asocio, kiu okupiĝas pri ĝia disvastigo. En poliglota renkontiĝo mi sidiĝis por kunmanĝi ĉe Esperanto-tablo kun deko da relative fluaj parolantoj de nia lingvo: eĉ ne unu estis membro en iu ajn Esperanto-organizaĵo. La instrumento funkcias. Tiu konstato fare de poliglotoj, lingvistoj kiuj prenis la tempon por ĝin ekzameni, profesiaj esploristoj kiuj nun konsideras serioze nian lingvon kaj ne plu hontas ĝin studi kiel signifan socian fenomenon, preparas novan vojon al la estonteco. Tion ni ankoraŭ ne plene perceptas, sed ĝi apenaŭ videblis dum la jaroj pri kiuj veteranoj sopire memoras pli amasan internan rimarkeblon de niaj adeptoj. Ni havis korifeojn kiuj lanĉis iniciatojn en diversaj epokoj. Edmond Privat kaj aliaj ebligis la agadon por provi akiri subtenon en la Ligo de Nacioj, Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj en Unesko en postaj jaroj. Tamen malgraŭ kuraĝaj elpaŝoj inkluzive por internaciaj eksperimentoj en lernejoj, laŭ pluraj analizantoj la movado daŭre emis koncentriĝi en pli limigitaj sferoj preskaŭ baritaj aŭ intence ŝirmitaj al la ekstera mondo.

Kaj nun via plej malfacila demando: ĉu ekzistas en la Estraro iu vizio kaj ankaŭ pli bone – certa strategio kiel daŭrigi tiun sukceson? Rilate vizion, mi ne povas paroli por la tuta Estraro. Tion ni ankoraŭ devos ellabori en la strategia laborplanado, kiu daŭre renoviĝos laŭ

la progreso farota. Tamen se ni konkludus ke Esperanto kaj ĝia “interna ideo” (se ni daŭre insistu pri tio) ne sukcesos nur laŭ ideologiaj argumentoj, kiu vojo povos sukcesi? Ĉu la mondo havas la komunikajn rimedojn por certe nin konduki al pli paca konekzistado laŭ la nunaj sistemoj de edukado? La respondo tute ne estas klara sen Esperanto. Pro tio ni devas koncepti vojon aŭ vojojn klare kompreneblajn kaj akcepteblajn, ekzameni niajn rimedojn, kaj esti pretaj laboradi konsekvence por atingi difinitajn celojn.

Sendepende de ILEI, Ivo Lapenna en sia periodo kiel prezidanto de UEA laboris por starigi signifan internacian eksperimenton pri la instruado de Esperanto. Tiutempe validis kiel ĉiam la kutimaj argumentoj: lingvo relative rapide lernebla por baza komunikado post unu lernojaro, faciligilo de lernado de aliaj lingvoj, instruebla de jamaj lernejoj instruistoj per trejnado en akceptebla tempo. Pro specifa cirkonstanco ne okazis la definitiva eksperimento kiun esperis aranĝi d-ro Lapenna. Ni tamen intertempe dokumentis eksperimentojn kiuj indikas la racion de tiu vojo, do ni estas parte preparitaj. La aldona elemento kiu povos pli klare subteni similan klopodon estas la hodiaŭa movado en la direkto de reorientiĝo al interkultura kompreniĝo kiel ĉefa celo de lingvolernado. La lernado de Esperanto specife kongruas kun tiu celo. Nur Esperanto kapablas malfermi fenestron al diversaj kulturoj sendepende de naciaj lingvoj. Neniu grupo de lernantoj havus la avantaĝon pli bone regi la lernatan lingvon. Ili povus komenci interkomunikiĝi pri komunaj intereso, kaj post interkonatiĝo ili estus pretaj esplori diferencojn. En kutima lingvoinstruado, reliefigas diferencoj, kaj tio povas fremdigi lernantojn de la nekonata kulturo. Per Esperanto eblas atingi la deziratajn edukajn celojn sen la neceso akceptigi ĝian “ideologion”. La evoluo de sintenoj pli kompreneblaj nature sekvas la lernadon. Jen almenaŭ unu vizio. Certe evoluos aliaj.

Do kiel daŭrigi la ĝisnunan sukceson? Komence per konstato (enketoj, dialogado) de mankoj, kaj de spertoj dezirataj de la partoprenantoj. Lernado per interagado povas esti pli malfacile atin-

gebla ol lernado per prelegoj, tamen se bone preparita, tio povas esti multe pli interesa kaj sukcesa. Same kiel por varbi novajn esperantistojn, necesas celi la jamajn interesojn de la dezirata publiko. Se membreco en asocio kontentige refortigas plivastiĝon de la propraj intereso, tio sukcesos. Rekoncepti kaj la edukon kaj la distran flankojn de nia agado estus esenca antaŭkondiĉo de sukceso.

Revuo Esperanto: ...[UEA] kiu ne nur lanĉis Virtualan Kongreson, sed kunlabore kun E@I kaj uzante ilian sistemon RetEvent jam la 5-an jaron sinsekve organizas tiun ĉi plej amasan virtualan renkontiĝon en la historio.

D.Ch.: RetEvent efikis ankaŭ por la Poliglota Renkontiĝoj, do bonega ekzemplo de efika programado, kiu servas ne nur la interesojn de la Esperanto-komunumo, sed ankaŭ de aliaj. Poliglotoj pli emas akcepti Esperanton pro la aŭtentaj servoj per kiuj Esperanto-organizaĵoj provizis por ilia plispartigo kaj pli efika interagado.

Revuo Esperanto: En tiu ĉi kunteksto ĉu ni bone komprenas, ke realigo de tiuj – ni ne timu diri epokfaraj – projektoj, tamen iagrade delogis UEA de ne malpli gravaj kaj esencaj laboroj, rilate la retan integriĝon?

Certe temas unuavice pri la renovigo de la propra ĉefretejo kaj ekuzo de AKSO (mastruma sistemo por la servoj de UEA). Tiujn oni promesis al la membroj jam antaŭlonge. Merite apertas demandoj kaj foje kritikoj, kiuj venas de la membroj. Kiel nun progresas la afero?

D.Ch.: Vi prave atentigas ke la bezono rapide ŝanĝi direkton al la aranĝado de virtualaj eventoj pro la pandemio kaŭzis deflankiĝon de la laboro necesa por krei strategian planon kiu estus fundamento por konstruado de nova infrastrukturo kiun nepre bezonas UEA. Mi iam komentis, laŭ tio kion oni komunikis al mi, ke la baza administra sistemo de UEA datiĝas de antaŭ 20 jaroj. Aŭskultanto ride respondis: "Malprave, vi devis diri de antaŭ 40 jaroj!" Mi ne kuraĝis esplori pli, prenante tion kiel ŝercon, espereble pli amikan ol malican.

Ni ne neas ke la longa evoluigo de novaj retejo kaj mastruma sistemo por la servoj de UEA naskis meritajn kritikojn, ŝercojn, malfidon inter niaj membroj. Mi antaŭ jaroj eĉ indikis esperatan daton por kompletigo de la AKSO-projekto, laŭ sinceraj indikoj komunikitaj al mi, tamen mi devis lerni lecionon pri promesoj rilate komputilajn sistemojn. Mi povus klarigi la longan liston de kialoj de tiu prokrasto, sed tio interesus neniu. La legantoj deziras honestan respondon al siaj demandoj.

Uzante la okazon, mi petas vin publikigi en tiu sama numero de nia revuo alvokon ke UEA nun serĉas kaj pretas dungi "akompananton", t.e. kunlaborantan programiston kiu progresigu la projekton AKSO. Tio signifas unuavice finan konkludan ekzamenon por konfirmi la rekomendon de TEJO ke ĝi funkcias kaj povas adaptiĝi al la bezonoj de UEA. La termino "akompananto" aludas al la fakto ke krom programistaj talentoj, la dungoto devos kapabli paciencie akompani la Ĝeneralan Direktoron kaj aliajn oficistojn en la transiro de la malnova sistemo al la nova, kaj resti kunlaboranto por la posta enkonduko de servoj al la membraro. Ni komprenu ke tiaj transiroj estas kutime kompleksaj. Necesas kompato kaj vera subteno al oficistoj. Funkcipova rezulto kun malofta interveno de pagata programisto, krom por ĝisdatigoj. Aliaj asocioj trovis ke la plibonigoj valoros la signifajn kostojn, sed nur se zorge antaŭ planitaj. Datoj por livero de la produkto? Ne tentu min, sed la laboro komenciĝu frue en la nova jaro kaj daŭru konstante ĝis ĉio montriĝos funkcipreta, kun gvidiloj kaj plano por prizorgado kaj necesa ĝisdatigado de la sistemo.

Revuo Esperanto: Dankon! Ni volonte publikigas! La Centra Oficejo – ni havas tiom da rememoroj pri ĝi! Kompreneble multajn membrojn tre interresas kio daŭre okazos kun la domo? Do, ĉu ĝi tamen estos vendita? Se jes, membrojn interresas iom pli da konkretaj detaloj pri tio.

D.Ch.: Efektive ne vendi la domon de la Centra Oficejo estas la plej nedezirata konkludo, ĉar nenio pravigus la kostojn de daŭra prizorgado. Kvan-



kam ni ne trafis la plej favoran momenton por vendo, kaj tamen sekvis la profesion rekomendon de la makleristo pri anonco de prezo multe pli alta ol ni imagis, ekzistas intereso de eventualaj aĉetontoj. Plej gravas nun rekonsideri kaj interkonsenti pri la prezopunkto kiu kredeble rezultigos la vendon. Merkatoŝanĝoj pozitivaj aŭ negativaj montriĝis ne antaŭvideblaj, eĉ por profesiuloj, alia el la pluraj defioj. Unu el la problemoj estas, ke la domo facile vendiĝus se la aĉetonto povus esti certa ke la loka registara instanco permesus rekonstruadon por loĝejoj kaj ne por oficejoj, sed tio bezonus ŝanĝon de la kategorio de la konstruaĵo, kaj tio ne estas certa. UEA povus peti la ŝanĝon anticipi, sed ĉar ni ne intencas mem fari tiun laboron, ankaŭ tio estus dubinda laŭleĝe. Ni ne urĝe premis, ĉar ankoraŭ restas por solvi la relo-kado de la Libroservo, kiu ankaŭ havas siajn komplikojn. Tamen ĉio estas decidenda en 2025 kaj ni laboros por ke ĉiuj transiroj estu maksimume glataj.

Revuo Esperanto: ...se ĝi ne plu estos uzata, ĉu restos iu loko por volontuloj, kiuj nun aktive kunlaboras en la CO?

D.Ch.: Ni retenos la nunan Volontulan Domon en la sama strato kiel oficalan leĝan sidejon por la Asocio, ĉar en la teretaĝo, uzita antaŭe de frizisto kaj nun malplena, estas spaco por pluraj laborantoj. Se ni trovas la neceson de pli granda centro, ni povus konsideri interŝanĝon aĉeton de alia konstruaĵo.

Revuo Esperanto: *La revo pri la unua UK en Afriko realiĝis. La kongreso estis eĉ pli sukcesa, ol oni povis imagi. Sed nun necesas jam kompreni kio plu:*

kiel nun kaj poste UEA daŭrigos sian agadon en Afriko?

D.Ch.: Ni estas kontentaj pri la impeto kiun donis la UK al la agado en Afriko, kaj sekvas diversaj kursoj kaj aliaj planoj. La afrikanoj mem deziras okazi sen granda prokrasto plian Afrikan Kongreson, tamen pro la financaj rimedoj kiujn UEA devis dediĉi el la Afrika fonduso kaj aliaj kontoj por ebligi maksimuman partoprenon de afrikanoj en la UK, kaj aliaj neatenditaj



elspezoj, ni kredeble bezonos tempon por subteni plian kongreson, krom se la afrikanoj mem kapablos trovi por tio la necesajn subvenciojn.

La konversacio estos daŭrigata en la sekva numero de Esperanto, januaro 2025.

Sperta programisto serĉata

En 2025, UEA intencas enkonduki novan administran sistemon kaj retejon por la Asocio, por simpligi la administran laboron, kaj ĉion modernigi por la membroj kaj la publiko.

Esencaj taskoj:

1. Konatiĝi kun la sistemo AKSO kreita por UEA/TEJO kaj konfirmi ĝian funkcieblon por UEA.
2. Kontroli la jam faritan laboron por Asociaj funkcioj kaj pretiĝi por faciligi enkondukon.
3. Identigi funkciojn kiuj bezonas aldonan aŭ novan programadon nun aŭ poste.
4. Gvidi la transiron inter la malnova kaj nova sistemoj, inkluzive datum-transprenon.
5. Akompani la oficistojn en la transiro, kun minimuma aldonata laborŝarĝo por ili.
6. Certigi glatan postlancan funkciadon kiu bezonas minimuman konstantan intervenon.
7. Zorgi pri preparo de facile uzeblaj gvidiloj por oficistoj, volontuloj kaj la membraro.

Kvalifikaĵoj:

1. Programista sperto sufiĉa por labori kun la jam laŭnorme ellaborita sistemo.
2. Kapablo amikeme, pacience kaj kompreneme akompani novajn nespertajn uzantojn.
3. Komunika kaj kunlabora kapablo en internacia kaj interkultura medio.
4. Regule disponebla tempo por progresigi projekton kun antaŭvideble plurmonata daŭro.

Por pli da detaloj, demandoj, kaj instrukcioj por prezenti kandidatiĝon, bonvolu tuj kontakti la Prezidanton kaj Ĝeneralan Sekretarion de UEA (adreso sur la dua paĝo de la revuo).

Ni deziras lanĉi la projekton frue en la nova jaro kun celo de plena funkciado dum la jaro.



**Sekvu kaj abonu
la Gazetarajn Komunikaĵojn de UEA
por informiĝi pri freŝaj novaĵoj ĉe:**

<https://uea.org/aktuale/komunikaĵoj>



Esperanto kaj edukado al la paco en la Metodo Montessori. Dua parto

(Daŭrigo. Komencon legu en la novembra numero 2024)

■ Federico Gobbo,
Universitato de Amsterdamo

2. Ideala renkontiĝo

Estas la ideo de paco tio kio kunigas Zamenhof kaj Montessori, laŭ la sulko jam antaŭ jarcentoj fosita de la germana filozofo Immanuel Kant, kiu parolis pri 'konstanta paco'. La vojoj respektive de Esperanto kaj la Metodo estas malsimilaj sed komplementas unu la alian por atingi la saman celon. En ŝia *Edukado kaj Paco*, ekzemple, oni legas la tiurilatan penson de Maria Montessori¹:

Paco estas praktika principo pri homeco kaj socia organizado kiu baziĝas je la vera naturo de la homo. Ĝi ne subigas la homon, sed lin starigas; ne humiligas, sed male lin konsciiigas pri lia povo sur la universo. Kaj pro la fakto, ke ĝi baziĝas je la homa naturo, temas pri ununura kaj universala principo, komuna al ĉiuj homoj [...] Ĉi tiu principo devas konduki al realiĝo de la scienco pri paco kaj la edukado de la homoj por atingi la pacon.

Komparu la Montessorian citaĵon kun la Zamenhofa sube, kiu venas el la *Dogmoj de Hilelismo*, broŝureto eldonita en 1906 per Ruslanda Esperantisto:

kiam aperas espero, ke anstataŭ premantoj kaj prematoj ni eble baldaŭ havos nur "homojn" kaj "regnanojn", [t.e. civitanojn] – nun por ni pli ol por iu alia nacio estas necese fiksi difinitajn politike-religiajn dogmojn, kiuj donus la eblon al iu



regnano de nia diversgenta patrujo, vivi en plena paco kun iuj aliaj regnantoj, ne altrudante al ili per rajto de pugno siajn pure familiajn idealojn.

La Zamenhofa koncepto pri 'homarano' tre similas al la Montessoria koncepto de 'nova homo'. Kaj 'montessoriismo' – vortigo ekuzita kiam la Metodo komenciĝis internaciigi, kompare kun 'socialismo', 'komunismo' kaj similaj² – kaj homaranismo intencas renovigi la homaron por estiĝi nova tipo de socio, kiu estu en konstanta paco: laŭ Maria Montessori, la celo atingendas per edukado de la infanoj ekde la frua aĝo en certa maniero; laŭ Ludoviko Lazaro Zamenhof, la sama celo atingendas per estiĝo de novspeca homgrupo kiu vivu kune per neŭtrale-homaj filozofia-religia principaro kaj lingvo. La Zamenhofa maniero inkluzivas edukadon de infanoj, sed tiu ĉi aspekto restas je la fono; la Montessoria maniero donas centran rolon al la lingva evoluo sed ne prenas pozicion pri la elekto de la lingvoj³.

La tre konata Zamenhofa koncepto pri homaro kiel 'granda tutmonda homa familio', por ĉi la paroladon en la unua Universala Kongreso en Bulonjo, estas preskaŭ samvorte esprimita en la Montessoria koncepto pri 'superkonstruaĵo' de 'granda tuthomara nacio'. Fakte, el la volumo *Edukado kaj Paco*, oni legas sur paĝoj 30-32:

Ni ĉiuj formas unu organismon, la Nacion Ununuran (N.U.). Ĉi tiu ununura nacio, kiu estis la nekonscia aspiro spirita kaj ankaŭ religia de la homa animo – ni prokla-

¹ La citaĵoj el la verkaro de Maria Montessori estas esperantigoj el la itala fare de la aŭtoro. Ankoraŭ ne ekzistas esperantigoj de la verkoj de la pedagogo, laŭ la scio de la aŭtoro.

² La Metodo Montessori komencis internaciigi en la 1910-aj, sed estis la jaro 1914 kiam Jo Werker fondis la unuan Montessori-edukservon ekster Italio, pli precize en Hago, Nederlando. Aparte gravis la multlingva revuo (en la angla, germana kaj franca) *The Call for Education* [Alvoko al Edukado], 'psiko-pedagogia' fakrevuo, kiu estis la unua bulteno de la internacia Montessoria Movado en la jaroj 1924-25, eldonita en Amsterdamo. Por pli da informoj, vidu la itallingvan artikolon, kun resumoj en la angla kaj kataluna: Vincenzo Schirripa (2022), *Una rivista internazionale per il movimento montessoriano*. [Unu revuo internacia por la montessoria movado], *Educació i Història: Revista d'Història de l'Educació*, 40, 55-81. DOI: 10.2436/20.3009.01.284.

³ En 1931 Maria Montessori gvidis internacian kurson pri la Metodo en Romo. Konferenco n-ro 36 klarigis la manieron helpi al la infanoj alproprigi la ĉefan lingvon en la lernejo. La teksto, verkita en la itala, aperas komplete en la retejo de la asocio *Opera Nazionale Montessori*.

mu tion per krio alvenanta ĉiun punkton de la Tero – finfine estis atingita. Naskiĝis la “homaro-organismo”: ĉi tiu superkonstruaĵo, kiu ensorbis ĉiun strebon de la homo ekde ĝia origino, realiĝis [per] la hodiaŭa homo kaj la civitano de la granda tuthomara nacio. [...] Absurdas pensi, ke tia homo, ekipita de popoloj pli fortaj ol la naturo, devas identiĝi ĉefe kiel nederlandano, franco, anglo aŭ italo. [...] Ne plu eblas fikcie konsideri naciojn kiel disigitajn per intereso, kiel en la pasinteco. Ne plu pravigeblas la ekzisto de ununuraj nacioj kun iliaj limoj, moroj, kaj diversaj rajtoj. Ĉiam estos homaj grupoj kaj familioj kun diversaj tradicioj kaj diversaj lingvoj, sed ili ne povos esti naciojn en la tradicia senco: ili estos devigataj unuiĝi kiel membroj de ununura organismo.

3. Kelkaj konsideroj

En la Montesoria vizio, la neeviteblo de la homa destino, laŭ spirita kaj religia aspiro, realiĝis per la unua ondo de tutmondiĝo. Tion Zamenhof apenaŭ povis sperti dum la tielnomata Bela Epoko (1870-1914), kiam la koloniisma tutmonda paco permesis la diskonigon de novaj teknologioj, kiel ekzemple la telegrafo, la telefono kaj la lifto, kaj krome la estiĝo de internaciaj normoj, kaj nepre menciindas la internacia poŝto (cetere, ĉi-lastas estas ofte uzata de Zamenhof kompare kun Esperanto por klarigi la lingvon internacian). La situacio de la mondo post la Unua Mondmilito rapide ŝanĝiĝis al militismo. Maria Montessori spertas tion, kaj jen la kialo, tutprobable, malantaŭ la uzo de primilitaj metaforoj por prezenti sian edukadan vidpunkton⁴:

Por ke edukado vere estu la savilo de la homaro kaj de la civilizo, ĝi ne povas resti ene de la limoj kaj en la formo per kiu hodiaŭ ĝi prezentiĝas. Hodiaŭ edukado restis tro malantaŭe kompare kun la nunaj bezonoj. Por uzi komparon karakterizantan la temon, oni povus diri, ke edukado restis je la nivelo de la lanĉo de la sago, kompare kun la nuntempa militarmilaro: kiel oni povus batali kontraŭ plenpovaj kanonoj kaj peraviadilaj bombadoj per sagoj? [...] Pro tio necesas konstrui kaj perfektigi la edukadan armilaron (Edukado kaj paco, pp. 37-38).

La ĥemiaj armiloj uzitaj en la Unua Mondmilito – kaj poste internacie malpermesitaj per la Protokolo de Genevo, 1928 – signalis la finon de la Pozitivismo, nome tiu ideologio (kaj idealo) laŭ kiu la homaj teknologioj estas esence bonaj, t.e. ili neeviteble portas al la progreso de la homaro. Tiu estas klara diferenco inter la vizioj de Zamenhof kaj Montessori, pro generaciaj kialoj. Zamenhof ne donis apartan rolon al teknologio kiel aganto de socia

(kaj politika) ŝanĝo, ĉar simple en la Bela Epoko tiu rolo ankoraŭ ne estis tiel klara; nur en la intermilita periodo ĝi iĝis nepreteratentebla, kiel atestas intermilitaj ĉefverkaj filmoj, kiel ekzemple *Metropolo* (1927), reĝisoro de Fritz Lang, kaj *Modernaj Tempoj* (1936), reĝisoro de Charlie Chaplin. Aparte grave, Maria Montessori substrekis la fakton, ke socio bazita sur la moderna industrio enhavas gravajn konsekvencojn en la kampo de edukado:

Edukado, kiel hodiaŭe oni komprenas ĝin, instigas la homojn al izolo kaj al la kultivo de la persona intereso: hodiaŭe oni instruas al la lernejoj ke ĉiu ne helpu unu la alian, ne sugestu al tiu kiu ne scias, nur zorgu pri la jartrapaso kaj la konkero de premio en konkurado kontraŭ la samklasanoj. Kaj, rezulte, ĉi tiuj kompatindaj egoistoj trovas sin poste en la mondo unu flanke de la alia kiel sableroj: ĉiu izolito disde la aliaj, kaj ĉiuj sterilas; se furiozas plenpova vento, ĉi tiuj homaj polveroj, mankaĵe je vivipova spiriteco, estos fortrenitaj de la eventoj kaj formiĝos kirlo da ekstermoj (Edukado kaj paco, pp. 38-39).

Do, kiel rekta konsekvenco, la Montesoria edukado portu al diversa rilato inter la homo kaj la teknologio, en kiu la homo iĝu denove centra:

La sekreto estas ĉi tie: en la ŝanco de la homo iĝi la reganto de la mekanika medio kiu hodiaŭ nur subpremas lin. La produktanto devas regi la produktadon. Nun, produktado intensiĝis danke al la scienco kaj atingis altan nivelon de organizado en la tuta mondo. Necesas do egalmaniere valorigi science la homajn energiojn, kaj organizi la homaron. Homoj ne povas plu esti senkonsciaj pri si mem kaj la mondo en kiu ili sin trovas vivi: la vera plago nun minacanta la homojn estas ekzakte ĉi tiu nescio (Edukado kaj paco, pp. 40-41).

Malgraŭ la diferencoj, esence la cefaj mesaĝoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj Maria Montessori komplementas unu la alian. Oni povas interpreti la sencon de la esprimo ‘templo hilelista’, kiun Zamenhof publike forlasis post jaro 1907⁵, kiel ideala ejo ne nur por aŭskulti “la verkojn de la grandaj instruistoj de la homaro pri la vivo kaj morto” kaj “por edukadi la junulojn kiel batalantojn por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco, ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malnoblaj malvirtoj”, sed ankaŭ, ideale, por bonvenigi Montessori-instruistojn por eduki la infanojn. El la idealo revene al la realo, la aŭtoro aŭspicias, ke venu aliaj konkretaj spertoj pri Esperanto utiligata en Montessori-lernejoj.

⁴ Piednote, oni notu, ke ankaŭ Zamenhof uzis primilitajn metaforojn, ekzemple ‘pacaj batalantoj’ kaj ‘pacaj armiloj’, por indiki respektive la aktivulojn kaj Esperanton, en sia plej konata verko, t.e. la poemo *La espero*.

⁵ Zamenhof tiel deklaris en la nura anglalingva intervjuo kiun li koncedis en sia tuta vivo. Vidu: *The Jewish Chronicle*, la 6-an de septembro, 1907, pp. 16-18.



Winnie-la-Pu

A.A. Milne. Klasika infanlibro kun bazaj informoj, en la angla, pri Esperanto kaj ĝia movado.
9+164 paĝoj, 19 cm. UEA, Roterdamo, 1992 (2-a eld).
Prezo ĉe UEA: 12,30 €

Tintilo kamela sonadas sur vojo vortplena Pri la internaj sentoj en starigo de la reta vortarego

■ Xiong Xinying (Frostelo)

Mi estas Xiong Xinying el la urbo Wuhan, Hubei-provinco. Mia Esperanta nomo estas Frostelo.


Jam en 2007 kiam okazis la 7-a Ĉina Esperanta Kongreso en Kantono, mi aĉetis du ekzemplerojn de la *Granda Vortaro Ĉina-Esperanta* (GVĈE) kompilita de s-ro Wang Chongfang, samokaze mi petis lian subskribon. Poste, la vortarojn mi konservis kaj ne volonte ilin foliumis. Por ĉiutaga uzado, mi aĉetis broŝuran eldonon (kun granda formato) de la sama vortaro!

Finfine en 2015, mi vidis la eldonon de la longe sopirata *Granda Vortaro Esperanta-Ĉina* (GVEĈ) kaj sendiference mi aĉetis du ekzemplerojn!

Dum la uzado de la presitaj vortaroj mi sentas nekonvenan konsultadon kaj limigitan serĉfunkcion. Sekve mi ekvolis ellabori kompletan bit-vortaron por faciligi al esperantistoj la studadon de Esperanto. Sed en la pasintaj jaroj ne realiĝis mia deziro pro la manko ne nur de tempo, sed de materialaj rimedoj ankaŭ!

En majo de la pasinta jaro (2023), mi venis al Xi'an por labori ĉe s-ro Ĉielismo Wang Tianyi. Mi estis tre danke al Tianyi pro lia akcepto; tuj mi sentis min trankvila kaj konsideris ion fari. Je la fava tempo kun ĝusta homo mi do decidis aktivigi mian deziron por krei veran bit-vortaregon, kiu integros la datumojn de GVEĈ, GVĈE, PIV, Esperanta-Angla Vortaro kaj Etimologia Vortaro. Krome, oni povos en la bit-vortarego elserĉi kaj simplajn vortojn kaj derivaĵojn kaj kunmetaĵojn. Ĉar mankis al mi materialaj rimedoj, mi malbindis la du ĉemanajn presitajn vortarojn por ilin skani kaj vorto-rekoni.

La malavantaĝo de tia traktado postlasas tro multe da eraroj kaj preterlasaĵoj, kaj la korektado estas kolosa laboro. Mi scias, ke maleblas havigi al mi, ordinara esperantisto, verajn vortaro-datumojn, sed kontraŭe mi devas



krei la prototipon de la bit-vortarego kaj per tio akiri aliulan subtenon. En la komenco, mi estis fantaziulo en aliulaj okuloj. Laŭ ili, tio estas projekto neplenumbla per individua forto. Mi elspezis kvin monatojn laborante po dek kvin horojn tage kaj finfine sukcesis elfari la unuan eldonon. Iu el miaj amikoj, vidinte la bit-vortaron, diris al mi, ke li havas la PDF-dosierojn de ambaŭ vortaroj de s-ro Wang kaj povas ilin liveri al mi, kondiĉe ke mi ilin ne disvastigu. Mi estas tre danko, sed mi petas pardonon, ke mi ne menciis ties nomon!

Ĝis tiam mia bit-vortaro stariĝis surbaze de la serĉa propaĝaĵo Mdict! Samtempe mi venis en kontakton kun s-ro Mao Zifu, fama esperantista klerulo, poeto kaj membro de la Akademio de Esperanto. Mi petis la subtenon de la Akademiano s-ro Mao, kiu siavice malavare donis al mi la fontkodojn de sia Esperanta bit-vortaro, kreita antaŭ pli ol dek jaroj. La programo estis skribita en la lingvo C#, dum mi lernis asembladon kaj lingvon C en la lernejo antaŭ pli ol 30 jaroj. Kaj poste mi mem lernis C++ por kelka tempo, sed mi neniam tuŝis la lingvon C#. En tiu momento mi, kiu faris firman decidon, havigis al mi lernolibron de la lingvo C# kaj, krom kontinue labori super la organizado de vortaro-fontdatumoj tage kaj nokte, lernis C# per ĉiuj miaj fortoj. Dank' al mia fundamento en lingvoj C kaj C++, tre rapide mi ekvidis la lumon de la pensmaniero de programado de C#. Mi ekprovis reskribi la unuan version surbaze de la kodoj de s-ro Mao!

En la venontaj ses monatoj mi streĉis miajn fortojn por krei bit-vortaregon kun plur-direkta konsultado

kaj multaj solvo-funkcioj. Februare de ĉi jaro, post la apero de la skanita versio mi lanĉis la novan eldonon kun oficialaj datumoj, kiun mi donis al kelkaj veteranoj (Mao Zifu, Liu Hongyuan, Gong Xiaofeng k.a.) por elprovado kaj erar-serĉado. Post ĉirkaŭ tri monatoj relative pliboniĝis ĉiuj normoj. Tion eksciinte, s-ro Zhao Jianping kontaktis min, dirante: "Se al vi permesos s-ro Wang, mi dublos vian bit-vortaregon!" Tio estas por mi tute simple ĝojiga novaĵo, sed ĝi dumtempe maltrankviligis min, ĉar kvankam mi iam renkontis s-ron Wang, mi neniam interparolis kun li. Mi povas diri, ke mi bone konas lin, tamen li ne konas min. Lian artikolon "Sub peza ŝarĝo, tintil' kamela sonadas tutvoje" mi antaŭe legis, pli ol unu fojon, kaj estis profunde kortuŝita. Tio fariĝis la movforto estigi al mi ideon krei la bit-vortaregon.

Mi tre ĝojas eksciinte, ke s-ro Liu Hongyuan tenas multjaran amikecon kun s-ro Wang. Efektive mi ankaŭ respektas s-ron Liu, ĉar lian gramatikan libron mi ĉiam uzas; mi tamen ne konas lin persone, kaj nur ofte renkontas lin surrete. Mi do provis kontakti lin kaj trovis, ke s-ro Liu estas tre afabla kaj preta doni helpan manon. Mi donis al li ekzempleron de la bit-vortaro kaj petis lian elprovon. Mi ankaŭ petis, ke li helpu al mi informi s-ron Wang pri tio en konvena tempo.



Kelkajn tagojn poste mi ricevis la respondon de s-ro Liu kaj eksciis, ke s-ro Wang pretas vidi min. Mi estis tre ĝoja kaj decidis viziti s-ron Wang en

la urbo Zhenjiang. Mi tuj aĉetis fervojan bileton per la reto. Mi veturos per la trajno, kiu atingos la urbon ĉirkaŭ 10:30, la 29-an de majo.

S-ino Shen Qiuyue, vicedestro de la loka Esperanto-asocio, venis al la Fervoja Stacidomo de Zhenjiang por min renkonti, kaj poste akompanis min al la hejmo de s-ro Wang. Post interparolado kun li, mi trovis, ke s-ro Wang estas veterano erudicia, afabla kaj modesta. Kun ĝojo mi libere parolis kun li pri la ideo krei bit-vortaron. Ankaŭ ĝoja, la Veterano Wang invitis min al la familia tagmanĝo. Li poste donis al mi la plejlastan reviziitan version (de majo ĉi-jare) de siaj tri ĉefaj vortaroj (*Gran-*



da Vortaro Ĉina-Esperanta, Granda Vortaro Esperanta-Ĉina kaj Ĉina Kutima Esprimaro Esperantigita) por mia dispono kiel font-datumojn!

En Zhenjiang, min varme akceptis la loka Esperanto-asocio. S-ino Qin Tong, estro de la asocio, kaj s-ino Shen Qiuyue, vicedestro de la asocio, akompanis min promeni sur la antikvaj stratoj, kaj ankaŭ igis gustumi la lokajn tradiciajn manĝaĵojn, kiel "pot-kovrila" nudelo.

Reveninte de Zhenjiang, mi tuj komencis per ĉiuj miaj fortoj krei la retan version de la tri grandaj vortaroj. Samtempe, mi ankaŭ lanĉis erar-serĉadon en la interna testgrupo (starigita por testi la fidindecon de la vortaro-datumoj kaj la disponeblecon de la softvaro). En la grupo troviĝas sep instruistoj: Wei Yida, Liu Hongyuan, Mao Zifu, Zhao Jianping, Gong Xiaofeng, Xiong Linping kaj Majstro Miaohui.

La malgrandaj program-kodoj de s-ro Mao baziĝas sur lokaj datumoj, kaj krome la vortaro-datumoj baziĝas sur la reĝimo (formato) *txt*, kiu ne povas uziĝi por la reto. Ŝajnis, ke mi devas nur komplete reskribi la subkuŝantan

kod-strukturon. Mi uzis la malgrandan datumbazon *sqlite* kiel la datumataningoreĝimon de la vortaro, kaj la baza tavolo de la programo integris la reĝimon retservo; tiele oni povas ĉiam konverti de la loka sola operacio al la B/S-aplikaĵ-reĝimo. Post duonmonata morte streĉita laboro, la prototipo estis finfine kreita:



Post kontinuaj provizado kaj testado de tiuj instruistoj, mi ricevis multajn valorajn proponojn de plibonigo, kaj poste mi sukcese registris la domajnmonon: *vortaro.cn*, kiu eĥas de distance al la okcidenta PIV-retejo: *vortaro.net*. Finfine stariĝis la hodiaŭa orienta vortaro-retejo!

Landa agado

Fizika klaso en Burundo

■ Aimé Patrick Manirakiza

La klubo estas nomata Paca Armeo kaj ĝi estas inter la plej aktivaj kaj popularaj kluboj nuntempe en Burundo, havante pli ol 40 aktivajn membrojn. En la klubo ni havas du kategoriojn da partoprenantoj: Komencantoj kaj Progresantoj.

La fizika kurso okazas ĉiam dimanĉe. La plej granda plimulto de partoprenantoj estas knabinoj. Krom Esperanto-trejnadoj, membroj de la klubo propagandas burundan kulturon per tradiciaj dancoj.

La klubo naskiĝis pasintjare en 2023 kun la celo vekti dormantajn esperantistojn. Nuntempe estas tiel, ke ene

de la klubo ni trovas aktivulojn, virinajn organizantojn de eventoj. Ĝi estas

klubo riĉa je kunlaboro, interhelpo kaj promocio de la esperantlingvaj lingvo kaj kulturo.

La instruisto kaj fondinto estas Aimé Patrick Manirakiza.



Bonaj, efikaj spuroj de la 109-a UK en Afriko

■ Aurora Bute

La Universalaj Kongresoj celas, i.a., stimuli intereson pri Esperanto ĉe la loĝantoj de la koncerna lando, kio povas konduki al kresko de la Esperanto-komunumo, kaj, precipe, revivigi la lokan kaj regionan E-agadojn. Alivorte, gravas tio, kio restas post la fino de la kongreso. Leviĝas la demando: ĉu la ĉi-jara UK lasis bonajn, efikajn spurojn en Tanzanio, en Afriko?



Ni ĉiuj jam scias, ke la preparo por la UK komenciĝis jarojn antaŭe, sed en 2024 ili intensiĝis: okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, en lernejoj, universitatoj, kluboj, per Zoom, Vacapo aŭ ĉeeste, en Tanzanio, Burundo, DR Kongo, Madakaskaro k.a., disvolviĝis projektoj, kiuj helpis pli vastan partoprenon, instruistoj el aliaj kontinentoj organizis kursojn, eĉ vojaĝis al Afriko por instrui, kaj ĉio ĉi helpe de la malavara subteno de la Esperanto-komunumo kaj Esperanto-organizoj, inter kiuj UEA ĉefrolis. Ĉiuj tiuj iniciatoj, agadoj, streboj, penoj estis fruktodonaj: la plej alta nombro de partoprenintoj en la UK venis el Tanzanio, la kongresa lando, Burundo kaj DR Kongo!

Mi volas referenci nur kelkajn UK-programerojn, kiuj, preskaŭ certe, havos favorajn sekvojn en Afriko.

La unua estas la trejnseminario por Esperanto-instruistoj, sub la gvido de Miora Raveloharison kaj Mireille Grosjean. La publiko estis granda, la salono plenplena, aro da afrikanoj volis pli-



bonigi siajn instrukapablojn helpe de spertaj instruistoj, mem praktiki kaj ekzerci. Mi faris kurson pri teorio kaj disdonis paperajn materialojn, sed ne estis sufiĉaj por ĉiuj partoprenantoj. Mi promesis sendi rete la materialojn al tiuj, kiuj ne ricevis, kaj, fine de la kurso, mi invitis ilin skribi siajn retadresojn. Mirinde, enviciĝis preskaŭ ĉiuj kursanoj por skribi siajn retadresojn, por ricevi materialojn por kursoj. Tio montras, ke en Afriko ja estas intereso por kreskigi siajn kapablojn en Esperanto, kaj kampanjo por sendi librojn al Afriko ne estas vana, sed vere utila kaj necesa!

Okazis, kiel kutime, kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Mi gvidis la konversacian rondon, kiu kunigis inter 16 kaj 25 partoprenantojn tage. Estis varmaj debatoj, plenaj de validaj kaj aŭdacaj ideoj, kiuj rigardas al la estonteco. Unu horo neniam sufiĉis por fini la debaton kaj en la fino la grupaj raportoj de la debatrezultoj estis tre riĉaj kaj en bona lingvo Esperanto. Eble indus fini la kursojn por progresintoj per debatoj de gravaj temoj, problemoj de la nuntempa Esperanto-komunumo en la nuna mondo, oni povus kolekti valorajn ideojn, kiujn oni transprenu kaj pludebatu aliaj esperantistoj, Esperanto-instancoj, ĉar ili povus generi utilajn projektojn.

La programero *Prezento de ILEI* konigis al afrikanoj la Ligon kaj ĝiajn revuojn *IPR* kaj *Juna amiko*, pri kiuj estis granda intereso. La prezenton faris Aimé Patrick Manirakiza, la nova estrarano de ILEI, kiu kaptis la atenton de la publiko. Li parolis ne nur por plenumi taskon, sed por vere konigi la ligon

de instruistoj al afrika publiko. Restis en mia memoro instigo kaj invito de Patrick al la ĉeestantoj: "Legu librojn! Ili nutras la menson".

Do, kio restis en Tanzanio, en Afriko, post la UK en Aruŝo? Restis centoj da kursanoj, kiuj lernis diversnivele la lingvon, didaktikaj materialoj por venontaj kursoj, praktiko kaj lertigo de instruistoj, kiuj povas kaj devus daŭrigi la instruadon, restis do homoj kiuj kapablas fari Esperanto-kursojn, restis libroj kaj revuoj donacitaj de UEA, de ILEI kaj unuopuloj, scioj pri la instancoj de la Esperanto-komunumo por tiuj afrikanoj, kiuj neniam forlasis Afrikon, restis belaj memoroj de kelkcentoj da afrikanoj, kiuj emocie kaj ĝoje pasigis semajnon en bela, amikema etoso, kantante kune ni, la alikontinentanoj, *Hakuna Matata* kaj *Malajka*, restis amikaj rilatoj, kontaktoj kun la Esperanto-mondo (mi mem korespondas kun kursanoj, volontuloj en Aruŝo, eĉ kelneroj, kiuj volas lerni la lingvon), kaj restis la instigo de Patrick: "Legu librojn! Ili nutras la menson".

Malkovru la 35 sekretojn!



Vi povas jam aĉeti la trian novelaron de la Interkultura Novelo-Konkurso!

bobelarto.ink

Cigna kanto de Arkoneso

■ Zbigniew Kornicki

La 38-a ARKONES (XXXVIII-aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto) okazis 13-15 septembro 2024 jam tradicie en Poznań (Poznań) Pollando. La faman kulturalan festivalon ĉeestis sume 150 partoprenantoj el 17 landoj. Riĉega arta kaj eduka programo, kiel ĉiam, ne permesis sekvi ĉion, ĉar la prelegoj okazis paralele en du salonoj. Ties enhavo ampleksis vastan palettron da temoj: kulturedukaj (Centramerika konservejo de kultura propraĵo, la Granda kanalo en Ĉinio, homiĝo de bestoj, perlingva terapio de la menso, persona ombro de kancero, vjetnamaj manĝokutimoj, praktika montro de vegana kuirarto, interhomaj rilatoj, retludo RISKŬO), prilingvaj (Lingvista Kongreso, kreoloj, plurlingvaj temvortaroj, familiaj nomoj kaj rakontoj, plantvortaro en Esperanto, tradukado), literaturaj (tradukado de la ĉina klasikaĵo *Ruĝdoma sonĝo*, kial legi E-literaturon, pri *Monato*, temoj de E-kanzonistoj), biografiaj (István Szerdahelyi, Lucien Péraire), aranĝoraportaj (UK en Tanzanio, UK en Brno, Pola E-Kongreso en Kalisz, vage tra BET-onta Kaunas) kaj movadaj (strategia laborplano de UEA, Unesko-celado, trejnado ĉe Vikimedio, diskutrondo pri la motivado de novuloj).

rich Matthias, Jerzy Leyk, Irek Bobrzak, Hoan Tr  n (  jo), Michael Farris, Robert Kami  ski, KuboF Hromoslav, Aida   zikait  , Fritz D  e, Zbigniew Kornicki¹.



Altnivelan artan programon konsistigis muzikkoncertoj, recitaloj, danca kaj teatra prezentadoj kaj aliaj. Ili estis: Ukraina Vespere (infana ensemblo *Danca Teatro* – koreografio Maryana Pak; Daria Dubynina; Tatiana Janowicka kaj Oksana Kovalivska); Koncerto por Bona Nokto (Anna Stanik, Marek Nahajowski, Oksana Kovalivska,   le el Bremeno, Vitor Monteiro). Jubilea Koncerto de Zuza Kornicka kun akompano de Mirek Bartkowiak; Tradicia Mielas Vespere (deklamado de Nikolau Dols, recitaloj de   le, Laima Vilkelyste, Vitor Monteiro); Unika estis muziko de Marek Nahajowski, kiu ludis kaj prezentis mezepokajn blovinstrumentojn; Koncerto de JoMo; teatra spektaklo Oni devas pardoni – fare de *Studio P* el Toru   (tradukis Teresa Nemere, re  isoris Lucyna Sowi  ska); film-prezento de JAZZ HAIKU, a  toris kaj deklamis ilin Urszula Zyburas, muzikakompanis   wi  tos  aw Fortuna; Tuwima  ojn deklamis Zbigniew Kornicki.

Funkciis anka   libroservo kun bonege eldonitaj libroj kaj el intermilita

periodo kaj postmilita kaj nuntempaj fascinaj eldona  oj el Bjalistoko, krome la   saj eldona  oj de la Interterlingvistikaj Studoj de AMU (temvortaroj kaj Szerdahelyi-libro).   io ne tro multekosta. La samo koncernis la prezojn en la bufedo, kiu havis oferton kaj por vianduloj kaj por vegetaranoj.


Substrekindas, ke multajn programerojn faris studentoj a   instruistoj de la Interlingvistikaj Studoj   e AMU, kun kiu Arkoneso de pluraj jaroj estis simbioze ligita. Doma  e kaj simbolo, ke pro organizaj kialoj amba   aran  oj samtempe   esas.

La unuan fojon ARKONES okazis en 1980 iniciatita de Zbigniew Kornicki, tiam gvidanto de Esperanta Kultura Centro   e la kulturdomo Orbita.   i-loke okazis la unuaj dek Arkonesoj. Post kelkara pa  zo la aran  on revivigis kiel   eforganizanto Pa  lo Janowczyk, kiu zorgis pri   i   is sia morto en januaro 2018. Arkoneso pli ol dek fojojn okazis en la artlernejo   ejery, kaj same poste pli ol dekfoje en la fervojista kulturdomo   is la nuna fini  o. Maleblas   i tie e   skize prezenti la nomojn tra la jaroj ligitajn kun la aran  o. Multaj detaloj jam trovi  as en la arkonesa pa  aro. Ni esperas iom post iom   topi ties bre  ojn kaj krome aparte prilabori koncizan historion de ARKONES.



Al la fidelaj arkonesanoj multope doma  antaj la fini  on de Arkoneso mi volas diri, ke ties   eso ne signifas   eson de la Esperanta Kulturo, des malpli ties malevoluon.

Detalojn pri titoloj de la prelegoj vi trovos rete   e la adreso arkones.org.



Prelegis: Gong Xiaofeng (Arko), Antonio Leoni de Leon, Ilona Koutny, Milan Kolka, Zhang Changsheng, Pascal Dubourg Glatigny, Philippe Planchon, Katalin Kov  ts, Duncan Charters, Ag  s Mozer, Fran  ois Lo Jacomo,   wi  tos  aw Fortuna, J  zef C    cik, Ul-

Junajn interpretistojn en Mastroĥto inspiras Esperanto

Federico Gobbo,
Universitato de Amsterdamo

La 1-an de oktobro 2024 la aŭtoro prezentis Esperanton dum evento nomata nederlande *Inspiratiedag*, laŭlitere ‘inspirotago’, ĉe la aplika universitato Zuyd¹ en Mastroĥto, kies ĉefcelo estas eduki novajn interpretistojn kaj tradukistojn. La invito venis post peto rekte al UEA, kiu agis kiel peranto. La celgrupo de la prezento estis studentoj de la unua kaj dua studjaroj, ĉiuj nederlandlingvanoj kiuj studas la anglan plus unu el la sekvaj lingvoj: la germana, franca aŭ hispana. Partoprenis pli ol 40 studentoj entute en la evento en la aŭlo de la universitata ejo, kaj la docentinoj de la franca kaj hispana lingvoj, plus kelkaj aliaj dungitoj.

Post ideumado kun la respondeculino pri la studentkomunumo kiu aranĝis la inviton universitatflanke, la duhora prezento konsistis el du diversaj momentoj, kun eta kafopaŭzo en la mezo. En la unua horo okazis rektameta prezento de la lingvo, nome la preleganto parolis Esperanton malrapide kaj iom teatre por prezenti la lingvon kaj ĝiajn historion kaj kulturon. Helpis la lumbildaro, kiu estis parte en Esperanto, parte paralele en Esperanto, la angla kaj la nederlanda. Ekzemplo estas la vorto ‘fulmokurso’, kiu legeblis per la lumbildoj paralele al la angla esprimo *a crash course* kaj la nederlanda *een spoedcursus*.

Rekte en Esperanto, studentoj ricevis la ĉefajn ŝlosilojn por ekkompreni la Esperantan gramatikon: la du bazajn finaĵojn -o, -a, respektive por substantivoj kaj adjektivoj, kaj la prefikson *mal-* kun tujkompreneblaj paroj, kiel granda/malgranda, dekstra/maldekstra kaj similaj. Aparte la transformo de substantivo al adjektivo estis bona bazo por kompari la absolutan regulecon de Esperanto kontraste al la komplikaj sistemoj de la angla kaj la nederlanda respondaj vortoj. Bildoj de granda kaj malgranda elefantoj, kaj familio de ĉevaloj utilis por doni impreson pri la

uzo de la afiksoj, per vortoj kiel ‘ĉevalajo’ aŭ ‘ĉevalaro’.

Iom da minutoj estis dediĉitaj al la koncepto de Esperanto kiel kontaktingvo inter la ĝermanaj, latinidaj kaj slavaj lingvofamilioj. Tion oni ilustris per la vortoj ‘terpomo’ kaj ‘aerŝipo’, respektive *aardappel* nederlande (sama strukturo, sed kun francaj vorteroj el *pomme de terre*) kaj *luchtballon* (laŭlitere ‘aerbalono’, kiu similas, se oni esplicite konsideras ĝian morfologion). Tuj poste, oni klarigis per mapoj, ke Esperanto venas el Eŭropo sed estas tutmonda lingvo, ĉar ĝiaj parolantoj venas el la tuta mondo: la kovrilo de la septembra numero de la revuo *Esperanto* dediĉita al la Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio, montris tion tre klare.

Pri la historio de Esperanto, la vivo de Zamenhof estis mallonge ilustrita per paĝo el la grafika rakonto *Bonvenon!*, kies aŭtoro estas la preleganto mem. Mapo montranta Bjalistokon kaj ĝiajn kvar etnogrupojn Zamenhofepokajn, nome polojn, rusojn, germanojn kaj judojn, faris la reston. Fama foto de informbudo pri Esperanto el Parizo en la 1920-aj kaj fotoĵo el la filmo *La granda diktatoro* (1940), montranta Charlie Chaplin sur la trotuaro de imagita juda geto kie legeblas sur vendejo la skribaĵo “Vestajoj malnovaj” (tiele, sen ĉapelo sur la litero ‘j’) enkondukis alian paĝon de grafika rakonto, ĉi-okaze el *Esperantists* de Dan Mazur, novjorka komiksisto, kiu unupaĝe montras la kontrastajn vidpunktojn kontraŭ Esperanto de Hitler kaj Stalin, angle (bedaŭrinde tiu grafika rakonto ankoraŭ ne aperas en Esperanto). Mencio de la Uneska rezolucio en Montevideo, 1954, montris ke la historio de Esperanto postvivis la Duan Mondmiliton, kies fino estis nova komenco por Esperanto.

Por anticipe respondi kutimajn demandojn, la prezento de la Esperanto-kulturo tuŝis kelkajn kernajn aspektojn: la Esperanto-tagon; la tabuajn vortojn (Jes ja! Homoj ne supozas, ke ‘artefarita lingvo’ povas havi ilin! Do

pli bone tuj montri ekzemplon: mi uzis memeon *Iru merden* kiu bilduldas kun Zamenhof kaj la metala bando *Iron Maiden*); la uzo de Esperanto en familio (denaskuloj ĉiam alvokas atenton); la ekziston de Duolingo-kurso (espereble ĝi neniam ĉesos! Mi neniam ĉesas surpriziĝi pri la bona impresado de tio inter Z-generacianoj); la rimarkindan grandecon de la Esperanta Vikipedio; la traktadon de Esperanto per Gugla Tradukado; ekzemplo de ChatGPT ‘parolanta’ Esperanton.

En la dua horo, post rondiro de demandoj kaj rimarkigoj, okazis grupa tradukekzerco de artikolo el *Monato* el Esperanto al la angla. En tiu horo ni sukcesis kune traduki la titolon kaj la enkondukajn vortojn. Temis pri artikolo kies aŭtoro estis la korespondanto el Slovakio. La temo estis internacia kunlaboro inter la insulŝtatoj, temo pri kiu la studentaro antaŭe sciis nenion. Ili estis tre impresitaj de la fakto, ke ili sukcesis traduki originalan Esperantaĵon ne simpligitan por edukaj celoj post nur unu horo de rekta alprenado de la lingvo kaj kvaronhoro de sesio por demandoj kaj respondoj pri la enhavo de la unua horo. Finis la prezenton dua sesio de demandoj, respondoj kaj rimarkoj. Post la ateliero, la studentaro buse ekskursis al la ejo de la tiama Neŭtrala Moresneto, kiu ne tro foras de Mastroĥto.



¹ Jen la ligo al la oficiala retejo de la aplika universitato, en tri lingvoj (la nederlanda, plus la angla kaj germana): zuyd.nl.

IKU reokazos virtuale dum la VK. AIS invitas proponojn por IVU-16 jarfine kaj SUS-41 dum BET

Amri Wandel

Pluraj sciencaj eventoj atendas nin en la proksimaj monatoj: novembre dum la Virtuala Kongreso, jarfine dum la Novjara Renkontiĝo kaj Luminesk', en julio dum BET en Kaŭno kaj dum la UK en Brno (Burno).

Scienca kaj Faka programo de la VK

La 5-a Virtuala Kongreso okazonta la 28.11-01.12.2024 havos riĉan programon, aparte sciencon kaj fakan. Krom la Virtuala Movada Foiro, denove okazos la Faka Forumo, vendrede la 29-an je la 17:00-18:00 UTC. Fakaj Asocioj kiuj intencas partopreni, bv. skribi al la vicprezidanto kaj estrarano pri Scienca kaj Faka agado de UEA, amri@huji.ac.il, indikante la nomon kaj retpoŝton de la prezentanto. Antaŭvidita daŭro de ĉiu prezento estos 3-5 min, depende de la nombro de prezentantoj.

Kiel indikite en nia rubriko en la novembra n-ro de *Esperanto*, la scienca programo inkluzivos plurajn prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj Scienca Kafejo prezentitaj en la UK en Aruŝo, i.a. de Fontaine (lase-ro), Gruner (la Berlina Kongreso pri Afriko), Jacobsen (la Mpenda efiko), Lagrange (Stefan Zweig), Raola (fosilia datado), Wandel (astrofiziko) kaj Zieba (Afrika filozofio).

Kadre de la VK TEJO okazigos je la 13:00 UTC, la 28-an de novembro 2024 la duan KonSciU, konkurson por junaj esploristoj kaj studentoj. La gajnintoj ricevos diplomon kaj premiojn, havos la ŝancon prelegi dum la 81-a Internacia Junulara Kongreso en Indonezio kaj estos invitataj proponi prelegon por la IKU dum la Burna UK. La partoprenantoj pre-

zentos dum ĉ. tri minutoj sian esploron aŭ analizon. Eblas aliĝi al la konkurso ĉe <http://tinyurl.com/konsciu24> ĝis la 25-a de novembro 2024.

AIS plu aktivas sen San-Marino

Dum la lastaj jaroj aperis onidiroj pri malfondiĝo de AIS en diversaj retejoj, inkluzive Vikipedion, pro la erara interpreto de la decido de la AIS-senato ne renovigi la formalan rilaton kun San-Marino (vidu <https://mallonge.net/1fn>). Tamen, Akademio Internacia de la Sciencoj vigle aktivas, organizante ĉ. 4 eventojn jare. Plurfoje aperis lastatempe en nia rubriko raportoj pri AIS-eventoj: en la Eŭropa Kongreso (la juna n-ro), en la UK en Tanzanio (septembro) kaj en la Hispana Kongreso (novembro). Abundas jam estontaj eventoj de AIS: kiel supre menciite, en la Virtuala Kongreso reokazos la IKU-AIS prelegoj okazintaj en la UK en Aruŝo. Sekve okazos la 16-a sesio de la Internacia Vintra Universitato en la du jarfinaj evenoj en Germanio, Novjara Renkontiĝo kaj Luminesk'. En julio okazos la 41-a sesio de Scienca Universitata Sesio (SUS) kadre de la Baltiaj E-Tagoj (BET) en Kaŭno, kaj IKU-AIS dum la UK en Brno (Burno). Por la lastaj tri eventoj estas bonvenaj proponoj prelegi, sendindaj al amri@huji.ac.il.

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



SOCIETO ZAMENHOF

Francio: F. Lo Jacomo,
N. Kesler.

PATRONOJ de TEJO

Pollando: A. Skudlarska.

DONACOJ

ĝis la 5-a de novembro 2024

Fondaĵo Afriko

Nederlando: TEJO 10,00.
Sumo ĉi-jara: 10832,56.

Fondaĵo Ameriko

Francio: F. Lo Jacomo 500,00.
Hungario: I. Szabolcs 50,00.
Sumo ĉi-jara: 658,41.

Fondaĵo Canuto

Nederlando: R. Moerbeek
25,00.
Sumo ĉi-jara: 3026,83.

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED)

Nederlando: R. Schmeits 15,00.
Sumo ĉi-jara: 15,00.

Fondaĵo Grégoire Maertens

Belgio: F. Witdoeck 300,00.
Sumo ĉi-jara: 9285,00.

Konto Informado

Por verdumigo statuo Jesuo:

Francio: D. Janot 200,00.
Korea Resp.: So J. 250,00.
Sumo ĉi-jara: 480,32.

Virtuala Kongreso 2024

Sumo ĉi-jara: 2722,00.

Ĝenerala Kaso

Britio: M. Sunder 10,00.
Nederlando: F. van Zoest 25,00.
Alianco 365: 155,00.
Sumo ĉi-jara: 9826,91.

Studentoj kaj instruistoj adiaŭas la Interlingvistikajn Studojn en Poznań

Fabio Fortes

Post 26 jaroj, la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Adam Mickiewicz-Universitato finas sian agadon, kun novaj 11 diplomitoj, sed la spuroj kaj atingoj de tiu iniciato daŭre restos en la movado.

Inter la 9-a kaj la 11-a de septembro, la lasta trijara studgrupo de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Adam Mickiewicz-Universitato en Poznań defendis siajn finlaboraĵojn. Entute, 11 studentoj prezentis temojn pri tradukado, interlingvistiko, historio de la Esperanta movado kaj metodiko. La finaj versioj de la laboraĵoj baldaŭ estos disponeblaj ĉe *Edukado.net*. Listo de la temoj kaj aŭtoroj aperis ankaŭ en la raporto ĉe: <https://edukado.net/novajhoj?id=910>.

Temis pri la oka studgrupo de tiuj jam memoreblaj Studoj por la tuta Esperanto-Movado. La Interlingvistika Fakto en la Adam Mickiewicz-Universitato estis fondita en 1997 per rektora dekreto kaj la unua grupo startis en 1998, ĝin animis kaj gvidis Prof. D-rino Ilona Koutny. Kun la partopreno de profesoroj kaj gastoj el Pollando kaj aliaj landoj, la studentoj havis la unikan ŝancon enprofundi siajn konojn pri la filozofio kaj historio de planlingvoj – inkluzive de Esperanto –, pri temoj rilataj al interkultura kaj internacia komunikado, pri Esperantaj literaturo kaj gramatiko, kaj aparte pri ĝenerala

lingvistiko kaj instruado. Krom la teoria parto de la Studoj, studentoj havis la okazon viziti Pollandon post la ĉeestaj lecionoj kaj ekzamenoj, kaj profiti belajn ekskursojn en Poznań, Toruń, Vroclavo. Kelkaj vizitis ankaŭ Varsovion, Krakovon kaj Bjalistokon, serĉe de la historiaj kaj kulturaj monumentoj lige al agado de Zamenhof kaj al la Esperanta kulturo en Pollando.

La Studoj en Poznań estis unu el la ĝis nun bedaŭrinde maloftaj oficialaj universitataj programoj pri kaj per Esperanto en la tuta mondo. Gravan rolon ĝi havas pro tio, ke ĝi samtempe ebligis la plivastigon de la scienco kono pri Esperanto kaj ties kulturo, kadre de la Interlingvistika Scienco, kaj la estiĝon de vere universitata programo en Esperanto, ebligante al esperantistoj el la tuta mondo ĝui la postdiplomajn studojn kaj kleriĝi per sia kara lingvo. Menciindas ke, dank' al la gvidado de Ilona Koutny, kun la valoraj partoprenoj de kolegoj kaj aparte de D-rino Katalin Kováts, granda parto de la programo estis registrita kaj konservita ĉe *Edukado.net* por



la uzo de la studentoj, kaj parto de la kursaro povis okazi ankaŭ rete.

Frukto de la kolektiva kapablo de la Studoj, valoraj publikaĵoj en la serio *Interlingvistikaj Studoj* aperis rilate al interlingvistiko kaj esperantologio, kun pli vasta alireblo rete ĉe la retejo de la pola eldonejo Rys kaj de la Interlingvistikaj Studoj (<https://mallonge.net/1g/>) en 4 volumoj:

- Věra Barandovska-Frank: *Interlingvistiko. Enkonduko en la Sciencon pri Planlingvoj*, 2020;
- Ilona Koutny (red.): *Esperanta Kulturo*, 2022 kun la kontribuo de pluraj aŭtoroj, prelegantoj kaj studentoj de la Studoj kaj same
- Ilona Koutny (red.): *Komunikado kaj Esperanto*, 2023;
- Ilona Koutny (red.): *István Szerdahelyi, elektitaj artikoloj*, 2024.

De la serio *Cross-linguistic and Cross-cultural Studies* (Translingvaj kaj transkulturaj Studoj), cele ĉefe al ekstermovada diskuto, aperis ankaŭ *Rolo de lingvoj en interkultura komunikado* (2020) kaj *Interkultura rolo de Esperanto* (2021), ambaŭ redaktitaj de Ilona Koutny, Ida Stria kaj Michael Farris, kun la kontribuoj de pluraj aliaj en Esperanto, la



angla kaj pola. Laste, en la sama serio, aperis *Ĝentileco en diversaj lingvoj kaj kulturoj* (2022), redaktita de Ilona Koutny kaj Agata Wolarska-Sobocińska.

Tiuj atingoj certe restos kiel heredaĵoj de la Interlingvistikaj Studoj de AMU por la movado kaj por aliaj espreblaj postaj universitataj programoj. Espereble, la diplomitoj dum tiu 25-jara fruktodona universitata entrepreno daŭre plivastigos la konon pri interlingvistiko kaj esperantologio, per la organizo de aliaj kursoj, eventoj kaj la apero de aliaj verkoj pri tiuj sciencaj terenoj. Fine, estas grave ankaŭ menci, ke la subteno de Esperantic Studies Foundation kaj de aliaj naciaj Esperanto-institucioj ebligis la partoprenon de pluraj homoj.

Pli persone, mi devas diri, ke la partoprenado en tiu universitata programo estas por mi bela atingo post mia 20-jaraĝa esperantisteco. Kiam mi eklernis Esperanton, altiris min nur la deziro lerni novan lingvon. Tiam mi aŭskultis la surkasedajn dialogojn de



iu pola radio-metodo de Esperanto. Iom poste, per la legado de kelkaj libroj el la biblioteko de nia loka asocio, Esperanto fariĝis unue *literatura lingvo* por mi. *La vivo de Zamenhof* de Edmond Privat kaj la Esperanta traduko de *Quo vadis* de Henryk Sienkiewicz, malfermis al mi, ankoraŭ adoleskanto, la pordojn de alia mondo, reva, transmara. Mi ne povis imagi ke jarojn poste, tiu revo konkretiĝos, kaj mi sentos min

efektiva parto de tiu mondo, kaj havos la okazon ampleksigi mian lingvan, kulturen kaj transkulturen horizonton per Esperanto. Mi profitas la okazon aparte gratuli kaj danki al Prof. Ilona Koutny por la senlaca laborado dum tiom da jaroj de la Interlingvistikaj Studoj, kaj esperas, ke la brilo de la Interlingvistikaj Studoj de la Adam Mickiewicz-Universitato iam alie daŭre lumigos nian komunan mondon.

Rete

Libro de Etsuo Miyoshi senkoste rete disponebla en Esperanto

Ekde kelka tempo la libro de Etsuo Miyoshi *Mia poliomjelito malŝlosis pordon al daŭripova paco: Invento, Sano, Lingva egaleco* disponeblas en Esperanto en la reto. Li decidis, ke ĉiu Esperanto-parolanto povu legi ĝin senkoste ĉe: <https://mallonge.net/1do>

Krome la libro disponeblas ĉe librovendejoj en la japana eldono kaj en tradukoj al la angla, franca, germana kaj pola lingvoj, en papera kaj elektronika formo.

Etsuo Miyoshi estas konata en Esperantujo, ĉar li ekde dudeko da jaroj engaĝiĝas por la disvastigo de Espe-

ranto en Eŭropo, ĉefe per tutpaĝaj gazetaj anoncoj.

Dum la lastaj monatoj li krome iniciatis personan leterkampanjon pri Esperanto al parlamentanoj el Francio, Germanio kaj Pollando.

En la libro Etsuo Miyoshi rakontas sian vivon personan kaj kiel entreprenisto de fabriko de gantoj. Li estis stimulita per la malfacilaĵoj el sia malsano, poliomjelito. Li interalie inventis specialajn valizojn, kiuj servas por apogi sin sur ili; krome la plej malgrandan faldeblan rulseĝon de la mondo. Ankaŭ lia engaĝiĝo por Esperanto estas prezentata.

Mia poliomjelito malŝlosis pordon al daŭripova paco: Invento, Sano, Lingva egaleco

Invento, sano, lingva egaleco

Honora prezidanto de akcia kompanio Swany
MIYOSHI Etsuo



Rekomendo por aktiva vivo, kiu ŝanĝas malesperon al espero

ASA Publishing Co., Ltd.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

BET-59 en Litovio

■ Gražina Opulskienė

Multaj esperantistoj certe aŭdis pri BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj) kaj homoj kiuj interesiĝas pri aranĝoj kaj strebas praktike uzi la lingvon eble jam partoprenis en iu de multaj jam okazintaj sukcesaj BET. Tradicia aranĝo, kiu ekde 1959 okazas laŭvice en Litovio, Latvio kaj Estonio estas bonega okazo por revidi amikojn, trovi novajn, paroli Esperanton, sekvi interesajn prelegojn aŭ lerni la lingvon en kursoj. La programo de Baltiaj Esperanto-Tagoj estos varia kaj abunda. Somera Universitato prezentos interesajn prelegojn, funkcios diversnivelaĵoj kursoj, libroservo, ĉiuvespere okazos artaj aranĝoj, koncertoj, estos organizitaj kvizoj, ekskursoj, diskutoj, tagojn finos jam kutima dum litovaj BET amika kunkantado en bona etoso. Se ankaŭ vi havas ideojn kiel eblas kontribui al la programo, ne hezitu kontakti la organizantojn: litova.ea@mail.lt.



En 2025 BET-59 okazos en Litovio, dua laŭ grandeco urbo Kaunas, inter la 5-13 de julio, kaj la partoprenantoj povos sperti ankaŭ la emocian por litovoj festotagon la 6-an de julio –Tagon de la Ŝtato – kiam samtempe ĉiuj litovoj en la mondo kantas la nacian himnon. Urbo Kaunas estas forte ligita kun Esperanto historie: Klara, la edzino de L.L.Zamenhof, devenis de tiu urbo kaj Majstro refoje gastis en la domo de la bopatroj.

BET-59 okazos en la Universitato de Vytautas la Granda, kaj krom la universitato kun Litova Esperanto Aso-

cio kunlaboras ankaŭ la Monda Centro de Litovoj. Por la partoprenantoj eblas uzi la universitatajn salonojn, aŭditoriojn, studentajn domojn, universitatan kafejon, komputilejojn, ktp. Estos organizita ebleco por la partoprenantoj manĝi surloke.

Kaunas estas bone atingebla per aviadiloj, trajnoj kaj internaciaj busaj linioj. Litovaj esperantistoj esperas, ke BET-59 kunigos ĝis 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. Bonvolu aliĝi jam nun: <https://mallonge.net/bet59>. Ĉiuj informoj pri BET-59 jam estas troveblaj en la paĝo de Litova Esperanta Asocio: <http://www.esperanto.lt/>. Kaj se vi havas demandojn aŭ bezonas pliajn informojn, la organizantoj volonte helpas.

Esperantistoj de tri Baltaj landoj vere strebas, ke tradicio de BET-oj restu daŭripova, BET-59 havas subtenon



kaj diversflankan helpon de la urba municipo kaj ankaŭ de ŝtataj instancoj, sed sukceso ankaŭ dependas de nia esperantista komunumo. Bonvolu aliĝi kaj certigi, ke vi ne maltrafos la okazon reviziti Litovion aŭ malkovri ĝin spertante interesan semajnon kun samideanoj de diversaj landoj.

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO



La kvina eldono de INK atendas viajn novelojn kun la temo:

La detalo kiu ŝanĝas ĉion

Limdato: 30-a de junio 2025

bobelarto.ink/konkurso



Laste Aperis

Aktoj de la Simpozioj de ILEI, 2022-2023. Red. Alessandra Madella. Pisa: Edistudio, 2024. 284p. 21cm. Ilus. ISBN 9788870360967. Entute 23 tekstoj de prelegoj. € 21,00

Ĉirkaŭ la literaturo. Artikoloj, prelegoj, recenzoj. Mikaelo Bronštejn. Thaumiers: La KancerKliniko, s.j. 32p. 30cm. Suplemento al *La KancerKliniko*. Aldone ankaŭ kelkaj tradukoj. € 6,60

Domo de forgesitaj libroj, La. Przemysław Paweł Grzybowski. Ilustraĵoj de Lucyna Fic. Kraków: Impuls, 2024. 19p. 24cm. ISBN 9788382943726. Ĉarma libreto, kiun la aŭtoro dediĉas al "ĉiuj amatoj de libroj". € 3,00

Elekti la ĝustan prepozicion. Praktika helpilo. Evgeni Georgiev. Brno: MSD, 2024. 135p. 21cm. ISBN 9788073924225. Abundo da ekzemplaj uzoj de prepozicioj kun substantivoj, verboj kaj adverboj, plus adverboj kun prepozicia funkcio. € 9,30

Esperantologio / Esperanto Studies. Nova Serio / New Series 5 (13). Red. Christopher Gledhill, Klaus Schubert. Rotterdam / New York: CED / Mondial, 2024. 143p. 24cm. ISBN 9781595694805. Kontribuaĵoj de Sabine Fiedler, Marc van Oostendorp, Wim Jansen, Jouko Lindstedt, Eric Macpherson Bailón, Nicola Ruggiero, Bipasha Bhattacharyya, Joseph Es-sertier, José Antonio del Barrio, Klaus Schubert. € 15,60

Hoodjooki. Priskribo de Dekfutkvar-drata Kabano. Sentoj de Budhan-ermito de XIII jarcento. Kamo no Tjoomei. El la japana trad. Nohara K. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2020. 38p. 21cm. ISBN 9784930785763. Dulingva: E, japana. Notlibro (1212) de japana aŭtoro, dum li vivis ermite en dometo. € 3,00

Internacia Kongresa Universitato / Scienca Universitata Sesio. 77-a sesio, 109-a Universala Kongreso de Esperanto, Aruŝo, Tanzanio. 3-10 aŭgusto 2024/40-a sesio, Eŭropa Kongreso de Esperanto, Strasburgo, Francio. 11-12 de majo 2024. Red. A. Striganova, D. Ševčenko, A. Wandel. Impeto, 2024. 197p. 20cm. Ilus. ISBN 9785716103276. Tekstoj aŭ resumoj de dudeko da prelegoj diverstemaj. € 18,00

Laudate Deum. Apostola instigo al ĉiuj homoj de bona volo pri la klimata krizo. Papo Francisko. En Esperanton trad. div. Roma: IKUE, 2024. 39p. 21cm. ISBN 9788894760637. Teksto de 2023. € 3,90

Laudato si'. Encikliko pri zorgado de la komuna hejmo. Papo Francisko. En Esperanton trad. div. Roma: IKUE, 2024. 176p. 21cm. ISBN 9788894760620. Teksto de antaŭ deko da jaroj. € 8,10

Nubumo. Giuseppe Campolo. El la itala trad. N. Rossi. Novjorko: Mondial, 2024. 103p. 22cm. ISBN 9781595694812. "... romano, kies interpreteblo bezonas aparte

doktajn taksokleojn kaj literaturkritikan sentemon klarvidan kaj nekonformisman..." (la tradukinto). € 15,00

Pli leĝera ol aero. Rakontoj kaj fabeloj. Ĥristina Kozlovska. El la ukraina trad. P. Palivoda. Novjorko: Mondial, 2024. 153p. 22cm. ISBN 9781595694829. La rakontoj de tiu ĉi premiita verkistino fascinas de la komenco ĝis la fino per neatenditaj agoj, kapabloj, eventoj. € 19,50

Sekreta vivo de miaj najbaroj, La. Ĉefred. François Bolduc. Montréal: KAVA-PECH, 2024. 434p. 20cm. ISBN 9782925496007. Finalistaj noveloj de la tria eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso. 35 noveloj en Esperanto; kelkaj ankaŭ en aliaj lingvoj. € 18,00

Ŝirmejo, La. Paulo Sergio Viana. Novjorko: Mondial, 2024. 97p. 22cm. ISBN 9781595694843. Kolekto de tekstoj inspiritaj de volontula kuracista laboro de la aŭtoro en malriĉaj maljunulejoj en Brazilo. € 15,90

Tempogardistoj de Esperantujo. Sciencfikcia historia rolludo. Toni Espinoza. Reus: Asociación Cultural Ĝuo, 2024. 73+12p. 28cm. Kolorilus. Originala Esperanta teamludo. La teamo dediĉas sin al "riparado de la tempolinio". € 12,00

Tri komedioj. Carlo Goldoni. El la itala trad. J. Horvath. Budapest: HEA, 2024. 216p. 21cm. ISBN 9789635715121. *La kuratoro, La mensogulo kaj La ŝajna malsanulino*. € 18,00

La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 €) por ordinara sendo. Por pakajoj sendotaj al landoj ekster Eŭropa Unio necesas pagi aldonajn sendokostojn: 3 €/kg por landoj en Eŭropo kaj 4 €/kg por la cetero de la mondo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

Bonvolu noti ke en la rubriko Laste Aperis de la revuo *Esperanto* de UEA listiĝas nur varoj aĉeteblaj ĉe la libroservo de UEA!



Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono. Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitaĵojn kaj nerecenzitaĵojn oni fakturos al la ricevinto.

Indekso-2024

A

Abbasi, H. 182
Adjévi, A. 34–35, 55, 183
Afriko 10–11, 34–35, 36, 44, 55, 56, 57, 60, 61, 77, 80–81, 84–85, 88, 92–93, 99–100, 102–103, 105, 128, 136–137, 171–174, 175, 178–179, 180–181, 190, 195–196, 197, 198–199, 200, 201, 202–203, 204–206, 209, 221, 235, 253, 254
AIS 36, 88–90, 178–179, 257
Almanza Lanz, G.M. 23
Alves Filho, A.A. 186–187
Amerika Komisiono 37, 47
AMO 19, 37, 113
Artefarita Intelektio 93
Adúriz, M. G. 225
Auld, W. 147–149

B

Barato 221
Békés, P. 86
Belartaj Konkursoj 176, 225
Basso, M. 183
Belošević, M. 180–181, 199
Bempt, M.V. 132
Besenyei-Merger, S. 197
Bick, E. 62–64
Blanc Maillard, Ch. 239
Bojčin, E. 83
Boulton, M. 147–149
Brandenburg, U. 138
Brazilo 37, 104, 186–188
Brazzabeni L. 104, 128
Breuninger, E. 204–206
Brinson, M. 166–167
Brücker, Ch. 222
Bute, A. 156–163, 223, 254

C

de Carvalho, A.H. 22
Charters, D. 3–4, 28, 31, 32–33, 37, 78–79, 127, 129, 156–163, 182, 246–249
Corsetti, R. 29, 30, 52–53, 56, 101, 133, 155, 177, 212

Ĉ

Ĉinio 16–18, 31, 32–33, 40–41, 41–42, 58, 123–125, 133, 137, 185, 226–227

Ĉ

Ĉeliauskas, P. 215

D

Dasgupta, P. 30
Del Pizzo, G. 111
De Smedt, P. 142
Despiney, B. 245–246
Dewi, I. 210–211
Dey, S. 221
Durwael, I. 235

E

Elbers, P. 143
Elstara Agado 200
Eriksson, B. 57
Esperanto en universitatoj 32–33, 68–70, 108–111, 123–125, 221, 224, 230–231, 234–235, 250–251, 256, 258–259
Esperanto-Tago 101, 151, 185
Estrara raporto 2023 156–163

F

Faka agado 54, 128, 150–151, 199, 208

Fake, Science kaj Profesie tra la mondo 20–21, 35–36, 88–90, 112–113, 141–142, 167, 178–179, 208, 236–237, 257
Fitjar, E.E. 239
Forpaso 22–23, 70, 94, 119, 142–143, 191, 215, 239
Fonseca, F. 188
Fortes, F. 258–259
Francio 139, 183, 184–185
Furorlisto 59
Futbalo 201
Fettes, M. 30, 56

G

Gabalda, L. 167, 184–185
Gallmo, G. 94
Garrido, A.S. 219–220
García, L.H. 215
Gazzola, M. 38–39
Gledhill, Ch. 150–151
Germanio 43, 45, 102–103
Giacometto, M. 148–149
Gilbert, N. 201
Goes, H. 99–100
Gobbo, F. 68–70, 108–111, 230–231, 250–251, 256
Gong, X. 156–163
Grabowski, premio 2023 4
Grollemund, P. 54
Grosjean, M. 44, 60, 92–93, 99–100, 136–137, 182
Gutiérrez, A. 149, 206–207
Gutiérrez, M. 126

H

Harmon, L.C. 239
Hasani, Sh. 23
Haupt, R. 239
Hori J. 130
Hult, F. 75–76, 191
Humuro 93

I

Idée, M.B. 172–174
IFEF 167
ILEI 51–53, 104, 186–188, 206–207
Indekso-2024 262–263
Interkultura Novelo-Konkurso 4-a 9, 197
Internacia Kongresa Universitato 88
Iranghe, M. 182
Israelo 117, 138, 214
Italio 38–39, 90, 111, 114, 128

J

Jansen, W. 70
Japanio 12–13, 15
Jatina 40–41
Ji, Ch. 31, 123, 133

K

Kadar, A. 156–163, 177
Karbe, N. 215
Kalniņš, A. 142
Kasati, E. 56
Kawakami, T. 215
Kenjo 116
Kimura, G. C. 66–67
Kitagawa, H. 12–13
Konga Stelo, revuo 221
Kongo DR 128, 221
Kongresoj, renkontiĝoj
AMO-seminario, 109-a 126
Afrika Kongreso de Virinoj, 2-a 174–175
Argentina Kongreso de Esperanto, 64-a 238
ARKONES, 38-a 255
Baltiaj Esperanto-Tagoj, 59-aj 260
Brita Kongreso de Esperanto, 104-a 148–149
Esperantologia Konferenco, 46-a 56
Eŭropa Esperanto-Kongreso 2024 36, 147, 184–185
FAJRO 2024 219–220
Ĝenerala Konferenco de Unesko, 42-a sesio 51–53
Hispana Esperanto-Kongreso 2024 236–237
IFEF 2024 167
ILEI-kongreso 57-a 104, 186–188
Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto, la 52-a 105, 202–203
Irana Esperanto-Kongreso, 11-a 152–154
Israela Kongreso, 2024 138
Itala Kongreso de Esperanto 2024 90
Japana Esperanto-Kongreso, 110-a 12–13
JES 2024-2025 222
Konferenco de la Civila Socio, 69-a 166–167
KonSciU 2024 237
Kuba Esperanto-Renkontiĝo, 8-a 126
Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj, 4-a 16–18
Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj, 5-a 226–227
LIBE-kongreso 2024 106
Librexpo Livorno 2024 128
Literatura Duonmaratono, 2-a 82–83
Luminesk', 2023/2024 43
Nitobe-simpozio, 9-a 38–39
Novepoka Esperanta Laborkunsido 2024 58
Rusiaj Esperanto-Tagoj 2024 213
Tut-Amerika Kongreso de Esperanto 2023 37
UK, 109-a 55, 77,

80–81, 84–85, 88, 105, 171–174, 177, 178–179, 180–181, 190, 195–196, 197, 198–199, 200, 201, 204–206, 254
UK, 110-a 237
Virtuala Kongreso 4, 6–8, 14–15, 20, 237, 257

Konstruado, revuo 54
Koperniko, N. 88
Kornicki, Z. 255
Koutny, I. 224
Kroatio 86
Kubo 126, 206–207
Kudrjavceva, R. 213

L

Landa agado 12–13, 40–41, 41–42, 45, 47, 61, 114, 128, 185, 214, 221, 226–227, 253
Laste Aperis 5, 65, 118, 131, 189, 261
Le Dru, E. 195–196
Leoni de León J.A. 234–235
Letero de leganto 57, 155, 235
Libroj

Afero de Espero 99–100
Doktoro Esperanto kaj la lingvo de Espero 176
Dum sunsubiro 107
Esperanto por mi 130
IKU-libro 2024 178–179
Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo 15
Mengzi 207
Mil kaj unu noktoj 139
Pri la revoluo de la ĉielaj korpoj 88
Printempa teruro 235
Oriento-Okcidento, serio 134–135
Timulo, La 86
Winnie-la-Pu 14–15

LIBE 106
Lin, L. 185
Lins, U. 190, 243–244
Lipari, M. 147
Lodewyckx, H. 10–11

Lo Jacomo, F. 51–53, 80–81, 156–163, 228–229, 245–246
Long, Y. 207
Lunazzi, J.J. 215

M

MacAoidh/McKay, G. 239
MacGill, S. 19, 113
Maas, H.D. 119
Maertens, G. 27–30
Mafwila, J. 128
Maĝarova, I. 107
Madella, A. 187–188
Mahé, C. 239
Maia, F. 156–163
Malagasio 61, 102–103
Malovec, M. 235
Mamdoohi, A. 152–154
Manirakiza, A.P. 253
Mansrud, A. 119
Matsumoto, T. 142, 190
Matthias, U. 102–103
Matte, G. 37, 47
M'Bow, A.M. 245–246
Mbassa, M. 209
Mbuangi, C.N. 142–143

Membraro de UEA en 2023 95
Minnaja, C. 232–233
Mirzabajev, G. 143
Miyoshi E., 155, 214, 259
Modest, J. (Mihal-kov, G.) 86, 235
Moonen, J. W. 239
Moritz, U.J. 142
Muhire, J. 198–199, 221

N

Ndagijimana, J. 203
Nelson, Ch. 215
Nowakowska, M. 21
Nyamkinda, M.S. 210–211

O

Oficiala Informilo 19, 39, 71, 91, 115, 131, 151, 190, 201, 238, 257
Opinio 66–67
Opulskienė, G. 260

P

Patas d'Illiers, L. 138
Petrović, R. 106

Pires de Holanda, O. 239
Piton, J. R. 22
Popova, E. 107, 130, 232–233
Premio Deguči 210–211

R

Raveloharison, M. 61, 174–175
Recenzo 86, 235
Rete 62–64, 129, 252–253, 259
Rezolucio de la 109-a UK 179
Rezolucio Montevideo 243–245
Ripani, M. 114
Riso, S. 244–245

S

Sabiyumva, J. 156–163, 182
Sartoro, Ro. 238
Schäffer, M. 156–163
Schlumberger, S. 239
Sekelj, T. 15
Selimi, B. 23
Serbio 106
So J. 156–163

Spezkonto 2023 164–165
Strategia Planado 127
Striganova, A. 6–8, 14–15, 82–83
Sun, M. 124
Suchánek, J. 239
Swenson, R. 94
Szabó-Felső, F. 30

Ŝ

Ševčenko, D. 6–8

Š

Štimec, S. 15

T

Tanzanio 55, 77, 80–81, 84–85, 88, 105, 112–113, 171–174, 175, 178–179, 180–181, 182, 195–196, 197, 198–199, 200, 201, 202–203, 204–206, 209, 254
TEJO 21

Tonkin, H. 27–28, 30, 52–53, 116, 151, 191
Tur, A. 233

U

UEA 3–4, 6–8, 27–30, 31, 32–33, 47, 51–53, 55, 75–76, 78–79, 101, 116, 127, 140, 150–151, 156–163, 188, 191, 210–211, 212, 237, 246–249, 263
Unesko 51–53, 133, 140, 228–229, 243–246
Unesko-Kuriero 133
Unuigintaj Nacioj 75–76, 116, 166–167, 191, 212

V

Van den Beld, Lic. A.J.M. 239
Venkatesh, Sn. 21, 237
Virina agado 149, 187–188
Voĉo de Kilimanĝaro, La 183

W

Wandel, A. 20, 35–36, 43, 88–90,

93, 112–113, 117, 141–142, 156–163, 167, 178–179, 208, 214, 236–237, 257
Wells, J. 30
Westermayer, M. 36
Wickström, B.A. 56
Wu, G. 16–18, 41–42, 58, 226–227
Wunsch-Rolshoven, L. 46–47

X

Xiong, X. 252–253

Y

Yasumasa, M. 191
Yinbao, H. 137

Z

Zafinifotsy, R.L. 202–203
Zaleski-Zamenhof, M. 182
Zamenhof-Tago 34–35, 41–42
Zhang, Ch. 147–148
Zhu, X. 124–125
Zilvar, P. 45

UEA

Elekto de komitatanoj B de UEA

■ Martin Schäffer,
Ĝenerala Direktoro de UEA

En 2025 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2025–2028. Parto de ĝi estos la elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8.2) difinas: “Kandidato deklaras skribe sian pretecon kandidatiĝi, aldonante biografieton kaj deklaron pri siaj movadaj celoj, kiuj kune ampleksas maksimume 150 vortojn. Por esti valida, kandidato devas ĝis

la limdato ricevi skriban subtenon de 10 individuaj membroj el minimume 3 diversaj regnoj, en maniero kiu konformas al la preskribo en la anonco de la elektoj.”

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ĝis la 31-a de januaro 2025. Proponoj devas esti subskribitaj, do eblas uzi poŝton, fakson: +49 30 364280169, aŭ retpoŝton: bkomitatanoj2025@co.uea.org (oni sendu skanaĵon de subskribita papera dokumento, aŭ elektronike subskribitan dokumenton). Por faciligi la kolekton de subtensubskriboj vi trovas formularon ĉe: <https://mallonge.net/1hh>.

Uzo de la formularo ne estas deviga. Eblas subteni per iu ajn subskribita dokumento.

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum la du antaŭaj jaroj (t.e. 2023 kaj 2024) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon dum la du lastaj oficperiodoj, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol kvin kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos kvin komitatanojn B per reta / poŝta balotado.



**La 110-a Universala Kongreso de Esperanto
atendas vin 19-26 julio 2025 en Brno (Burno),
Ĉeĥio!**